




1\*87.118.

# STARTO

ORGANO DE  
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



novinka!

# DOMOVNÍ ČÍSLA



**ruch**

**LIBEREC**

Široká ul. 31

PSČ 460 31

VYRÁBÍ:

DODÁVAJÍ:

Jednoty, Priory Praha, Řempe Brno, Znojmo a nebo  
na dobírku přímo RUCH LIBEREC

Domovní čísla, která vyrábíme z polyesterové pryskyřice v tmavohnědé barvě, mají odstranit stávající uniformitu tabulek, která jsou určena pro povinné označení rodinných domů, chat, chalup a objektů.

Instalace domovních čísel se provádí lepením na omítku nebo obklad lepidlem na porézní a neporézní materiál.

Vhodné je také upevnění na čepy. Pro tento způsob instalace je nutné vyvrtat otvory na zadní straně čísla, do těchto zalepit např. epoxidem čepy, které potom zapustíme do omítky tak, aby čísla měla cca 10 mm odstup od zdi.

Jako čepy můžeme použít běžné ocelové vruty k zasunutí do hmoždinek.



# UNIVERSALA KONGRESO PEKINO

La plej grande ekstereŭropa Universala Kongreso  
estis la 71-a UK, okazinta en Pekino de la 26-a de julio  
ĝis la 2-a de aŭgusto 1986

En ĝi partoprenis 2482 kongresanoj el 54 landoj, inkluzive de 450 ĉinoj. La solena malfermo okazis je la 10-a horo, kiam post la tradicia akcepto la honoraj gastoj kaj diplomatoj eniris la salonegon, kaj kiam la estraro kaj membroj de la Honora komitato okupis siajn lokojn sur la poŝto, la silenton de tiu solena momento rompis la potenco de 66-voĉa bulgara-ĉina koruso. Ĝi aperis kvazeŭ magie sur la leviganta planko de la orkestra parto de la scenejo antaŭ la podio. Kiam la pompe vestitaj korusanoj finkantis la Himnon, malrapide komencis "sinki" en la orkestron kaj al la mikrofono direktigis Grégoir Maertens, prezidanto de UEA, kiu jam por la sesa sinsekva fojo, preskaŭ kiel tradicia inaŭguranto salutis la UK. Li dankis al la Alta protektanto s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉina Popola Respubliko, kiun reprezentis s-ro Huang Hua, prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK. Inter alie li diris: "La internacia Esperanto-movado per ĉi tiu majesta manifestacio fermas la unuan jarcenton de la Internacia Lingvo kaj inaŭguras la tutmondan priŝtadon de la centjarigo de Esperanto. Estas aparte konyene, ke ni komencas tiun novan etapon per ĉi tiu kongreso, kies ĉeftemo estas interkompreniĝo, paco, evoluo."

Poste parolis Chen Yuan, vicprezidanto de LKK kaj CEL, en kies nomoj li varme bonvenigis la kongresanojn, dankis al la ĉina registaro kaj gesemideanoj el diversej landoj pro iliaj gravaj subtenoj kaj esprimis konvinkon, ke malgraŭ certaj mankoj kaŭzitaj de nesperanto de LKK kaj generalaj malfacilaĵoj de evoluanta lando, la kongresanoj ne plendos estante ĉiam batalantoj kontraŭ malfacilaĵoj.

En la nomo de Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj Alta Protektanto de la 71-a UK kaj en sia propra nomo kiel prezidanto de la Honora Komitato de la kongreso salutis s-ro Huang Hua aprezante Esperanton kiel grandan idealon kaj praktikon kaj diris i.a., ke "ekde sia naskigo Esperanto ligigas kun pacaĵ idealoj. Ĉiujare la Kongreso de Esperanto tial estas solena manifestacio de la paca potencialo de esperantistoj."

Ankaŭ s-ro Chu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj vicprezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK kaj prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto" salutprelegis, dirante i.a.: "Kiel sincera amiko de Esperanto mi ĉiam esperas, ke la lingvo estos popularigata kaj en



ne tro malproksima estonteco ĝenerale agnoskita internacie."

Foste parolis la juneco Chen Haosu, vicurbestro de Pekino, en la nomo de Pekina Registaro / kies vicprezidanto li estas / en aparte bona kaj leŭta Esperanto. Kvankam li post kelkaj frazoj transiris al la ĉina, li rikoltis tondran aplaudon. Inter alie li deklaris: "Mi komprenas la idealon kaj kredon de Zamenhof.... Ĉinio kaj ĝia ĉefurbo Pekino partoprenas en nia Movado jam de Ĝa komenco de la 20-a jarcento.... Kaj nun, kiam nia lando eniras novan historien periodon kaj komencas praktiki sian malferman politikon, esperanto fariĝis impona arbego sur la ĉina tero.... Brila perspektivo aperos en la dua jarcento de Esperanto...."

Sinsekvis paroloj de diplomatoj de multaj landoj en Ĉinio, inter kiuj ambasada konsilisto de Pollando parolis tute en Esperanto, invitante al la 72-a UK en Varsovio, kio vekis grandan aplaudon. Ankaŭ vicedirektoro de Radio Pekino salutis la kongreson.

D-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, en sia inaŭgura parolado i.a. diris: "Per rezolucio de la 24-a de oktobro 1985 la Ĝenerala Asembleo de Unuigintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 la Internacia jaro de la paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas "vivi kune en paco kaj praktiki toleremon". Estas konate, ĝi aldonis, ke edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontribui al tiu celo." Unu monaton pli poste, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion, kiu rekonis la jubileon de la internacia lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la ĝeneralan direktoron de Unesko sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto flanke de internaciaj organizaĵoj kaj rekomendis, ke tutmonde enkonduku oni en la lernejoj studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto. Sekvante la rekomendojn de UN kaj konsciante pri la decido de Unesko, UEA elektis kiel ĉiĵaran temon de sia kongreso la temon "Interkompreniĝo, Paco, Evoluo". Tiu temo klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Por konstrui la pacon necesas pozitiva agado en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron, kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco. La kreinto de Esperanto komprenis tion.... Je la sojlo de la Jubileo de Esperanto ni salutas la evoluantan novan Ĉinion, ni salutas la arkitektojn de la paco tra la tuta terĝlobo kaj ni salutas la parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj faras sian kontribuon al kreo de paca mondo...."

La kongreso estis malfermita.... Pli ol 100 programeroj kaj kunvenoj okazis ĉefe en la Pekina Scienca Halo. Kunvenis Esperanto-organizo de poŝtistoj, telekomunikistoj, radio-amatoroj, go-ludantoj, filatelistoj, foto-kino-magnetofono-amatoroj, fervojistoj, medicinistoj, sciencistoj, instruistoj, filozofoj, religiuloj k.a.

Laborkunvenis ankaŭ komisionoj de UEA, literatura, arta, lingva, scienca kaj de feka aplikado de Esperanto, eksteraj rilatoj, ekzamena komisiono de la Internacia Esperanto-Instituto kaj multaj aliaj.

En la Internacia Kongresa Universitato sciencprelegis 10 fakuloj, el Ĉinio, Brazilo, Jugoslavio, Usono, Bulgario, Pollando. Apartan sukceson havis la prelego de Viktor Sadler pri la sistemo LMT de la nederlanda entrepreno BSO. La prelegoj estis altnivelaj kaj helpis intersangi sciojn, dum diversaj teatraĵoj, vesperoj kaj baloj donis eblecon interkonatiĝi kaj interamikigi.

Okazis la Ĉina Vespero, Balo, Junulara Vespero, teatro, Nacia

Vespero, Internacia Arta Vespero kaj Recitalo.

La Folkloro Vespero estis luksa fabelo "Sur silka vojo", ĉiuflanke majstra teatraĵo, iom fremdiganta per sia lukso kaj dolĉeco. Tamen la kongresnoj lasis sin al la sukerumita mondo de la malnovstila fabelo.

Nacia Vespero - Ĝirlando de gracio, forto kaj bunto finis per fortega aplaudo de la internacia spektantaro, kontenta pro la vidita parto de la ĉina erta vivo.

Internacia Arta Vespero fariĝis digna prezento de la gastiganta kontinento - Azio. La vespero imponis aranĝita kun fakteco malofte spertita. Aŭdigis eĉ profesie komponita verko por bonvenigi la kongresanojn, nomita "Goĵa kunven' ĉe la Granda Mur".

La bulgara 50-membra ensemble kulminigis la vesperon per sia eminenta prezento.

Recitalon en la Ĉina Teatro okazigis la fama kanada kantistino Ĉarma Joëlle Rabu, nur antaŭ nelonge eklerninta Esperanton kaj tamen kantanta parton de sia repertuaro esperantlingve. Oni admiris sian nekredible belan voĉon kaj aktoran talenton.

Saniga gimnestiko, okezinta ĉiutage de la 7a ĝis la 7,30 multe plaĉis al pli ol 100 kuraguloj, kiuj ĝin praktikis.

Kursoj: Konversaciajn rondojn gvidis Stefan MacGill kaj Ilona Koutny, Progresigan kurson Spomenka Štimec, Ĉinan Eksprese Chen Fang, Cseh-seminaron por instruistoj Irena Szanser kaj Cseh-kurson por komencantoj Eva Farkas-Tatar.

Internaciaj ekzamenoj ne okazis pro manko de kandidatoj.

Dum la renkontigo de verkistoj kun siaj legantoj dialogis S. Štimec, T.Sekelj, R.Rosetti kaj C.Piron. Tie oni eksciis, ke ĉinoj ne povas atingi E-verkojn, pro kio ili MANE kopias ekzemple Esperantan Antologion!

Dum la kunveno, kies celo estis preparoli la staton de la laboroj por la Jubilea Jaro, oni krom multaj plendoj eksciis jenan ĝojigaĵon: Reĝo de Hispanio konsentas eniri Honoran Komitaton. Pollando preparas TV filmon. En Jugoslavio preparigas 24-leciona TV-kurso /Ĉiu leciono duonhora/, ktp, ktp.

Proksimume 150 kongresanoj partoprenis en la solena anonco de premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA. La rezultoj:

Poezio	I. premio	A.Goodheir /Skotlando/	"Adoro"
	II. premio	A.Goodheir	"Enlumigo"
	III. premio	K.Gilmore /Anglio/	"La poeto"
Prozo	I. premio	K.T.Jankoviĉ /Jugoslavio/	"Nokturno por blankulo"
	II. premio	F.Ksevero Moleono /Hispanio/	"Hura"
	III. premio	F.Ksevero Moleono	/novelo/ "Malantaŭ la pordo"
Teatraĵo	I. premio	S.Štimec /Jugoslavio/	"Fruŝtitaj vortoj"
		Gunnar Gällm /Svedio/	"Lingva demando"
	II. premio	K.Gilmore /Britio/	"La verda tendo"
		K.Gilmore	"Filozofio kaj realo"
	III. premio	J.M.Derzelle /Belgio/	"Se ĉiuj homarenoj"

Eseo Premio L.Minnaja: A.Goodheir "Esperanto en nova framo"  
Kanto Olena Kopistjenska /Sovetunio/ pro la kanto  
"Muziko"

Fotografio III. premio: Miyosi Tanaka /Japanio/ "Pacon al Hiroŝi-

ma - Stefano Mac  
Paco-branĉo /okaze de la Internacia Jaro de la Paco/ Gill /Nov-Zelando/ pro la poemo "Reveno al paco".

Entute okazis en Pekino 25 kunvenoj de fakaj Esperantaj Asocioj. Dum la 25-a jarkunveno de UMEA, St. Krajevski, membro de la pola delegitero, en la nomo de rektoro de Krakova Medicina Akademio, enmanigis al ĉinaj medicinistoj honoren medalon kaj diplomon. Le medicinistoj unuanime akceptis elvokon, kie oni legas:.... "ni akceptas elvokon al ĉiuj ŝanlaboristoj, plifortigi la internacian kunlaboron, konscie aliĝi kontraŭ nuklea minaco: baze faktoro por sano por ĉiuj estas la tutmonda paco!"

Akceptoj: Huang Hua aranĝis akcepton kaj bankedon por kelkaj centoj da kongresanoj en la parlamentejo, Radio Pekino gastigis siajn aŭskultantojn, Gaoji Shudien /libro-kompanio/ aranĝis solenan vespermanĝon por siaj klientoj, okazis ankaŭ bankedoj de vicurbestro de Pekino kaj de prof. Chen Yuan, Ĉina Internacia Turisma Servo bankedigis ĉiujn siajn klientojn ktp.

En la oficialaj Bankedo kaj Balo partoprenis ĉ. 900 personoj. Kuriero: "Al la nova etapo" estis ĝia titolo. Grafike kaj en have ĝi certe estis la plej bona kongresa kuriero ĝis nun. La redakcio El Popola Ĉinio meritas ĉiujn gratulojn pro la prizorgo de tiu laboro.

Ekskursoj: La karavano de 50 aŭtobusoj veturigis pli ol 1800 esperantistojn el 52 landoj kaj pli ol 300 ĉinajn esperantistojn al la Granda Muro sen ajna halto, kun trafikpolico fronte kaj fine de la karavano kaj helikoptero super ĝi. Por la kongresaj aŭtobusoj oni liberigis la vojon per haltigo de la cetera trafiko. Ĉiuj junaj, maljunaj senlace supreniris por provi ŝian forton kaj nesatigeble rigardis la grandiozan, superban pejzagon de la Granda Muro. Ili kantis, dancis kaj filmistoj de TV, fotistoj de EFC kaj diverslandaj esperantistoj filmis kaj fotis tiujn neforgeseblajn scenojn. Poste oni vizitis la subteren palacon de Ming-dinastio.

Okazis ankaŭ duontagaj ekskursoj: al la Imperiestra Palaco, Somera Palaco, Ĉiela altaro kaj Lamaista Templo. Miloj da stupoj estis supreniritaj, kio certe valoris pro neforgeseblaj vidindaĵoj.

La kongreso estis tre atentata de la ĉina registaro kaj koncernaj organizoj. La estraro de UEA estis invitita la 28-an de julio de vicprezidento de la Konstanta komitato de Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, kiu donis al ili bankedon en la Popola Halo. La 1-an de aŭgusto estrarano de Virina Federacio akceptis kongresanojn kaj transdonis al ili saluton de la ĉinaj virinoj. krome, Radio Pekino, la Pekina Magistrato kaj la Pekina Esperanto-Asocio aranĝis respektive kunsidojn kaj bankedojn. La rosta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisii filatelan tutajojn, kies postmarka bildo estas verda floro en formo de kvinpinta stelo kun tri multkoloraj folioj. En la centro de la floro flugas blanka kolombo el la literoj UK. La tri multkoloraj folioj aspektas kiel la cifero "71" kaj sugestas diversajn naciojn kaj naciajn lingvojn. Ĉe la malsupra angulo maldekstre de la tutaĵo estas ova-

la emblemo de la 71-a UK, ĉirkaŭ kiu flugas sep kolomboj.

3-ino Ĉan Ĉu Hua, en la nomo de la Pekina Brodeja Esplor-Instituto, transdonis al la prezidento de UEA ngkutiman donacon. Tiamis pri kvar metrojn longa kaj unu metron larga brodaĵo, farita honore al la kongreso kaj simbollanta ĉion, kio ligiĝas al Esperanto: la mondon /60 diversspecaj floroj/, pacon /7 blankaj kolomboj/, la Movadon /verda stelo/, la Kongreson /brodaĵo dediĉo al la 71-a UK/.

Oni elektis novan estraron de UEA:

prezidanto: d-ro Humprey Tonkin, Usono  
vicprezidanto: Josimi Umeda, Japanio  
generala sekretario: d-rino Flora Szabó-Felső, Hungario  
Estreranoj: G.Maertens, Belgio, J.Texier kaj d-rino B.Despiney, Francio, d-ro V.Sadler, Nederlando, Dicon Masterman, Britio-Italio, prof. d-ro Haszpra, Hungario.

La 2-en de aŭgusto okazis en la Ĉina teatro la ferma kunsido. Ĉin prezidis la nove elektita prezidento de UEA H.Tonkin kaj la ĝenerala sekretario Flora Szabó-Felső faris resumon pri la UK. 3-ano Tonkin emfazis en sia parolado 5 prioritatojn en la estonta laboro de UEA: 1. sukcesigo de la Jubilea Jaro, 2. plibonigo de la administrado en ĉiuj instancoj de la Asocio, 3. aparta atento al la instruado de Esperanto, 4. praktika utiligo de la Internacia Lingvo, 5. ekspluato de la pasintjara Rezolucio de Unesko en nia ekstera agado. Serĉe li nomis la 71-an UK "dikiga aŭ bankeda kongreso" kaj serioze peca kaj evolua. Li jene trafe esprimigis:

"For mi tiu ĉi kongreso estis ponto. Ĝi estis ponto inter kulturoj; ĝi estis ponto inter vivmanieroj; ĝi estis ponto inter la Nordo kaj Sudo, inter la Oriento kaj Okcidento. Melvasta eble ankoraŭ tiu ponto, malmultaj eble ankoraŭ la esperantistoj. Sed tamen tiu ĉi kongreso kreis tiun ponton, kiun ni sukcesos largigi tiel, ke la universaleco, al kiu ni sopiras - realiĝu." Li konstatis laŭ la konsisto de la kongreso kaj ĝia grandeco la Esperantomovadon efektive tutmonda, emfazis ĝian grandan rolon ankaŭ en helpo al la disvolvigitaj landoj en la scienco kaj tekniko. Li taksis la kongreson malgraŭ diversaj problemoj "entute brila sukceso", ankaŭ dank al senleca oferema laboro de LKK, kiu malgraŭ manko de spertoj kaj malfacilaĵoj de evolulando, organizis grandiozan kongreson. Ĉe la fermo s-roj G.Maertens kaj Y.Umeda voĉlegis po unu rezolucio: La Rezolucio por esperantistoj /movada alvoko/ emfazis la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fekaĵoj kampoj kaj reapelaciis al la landaj asocioj digne omagi la centjaran jubileon de Esperanto. La rezolucio por eksterstarantoj alvokis al la registaroj, ke surbaze de la Rezolucio RES 23/11-11 de Unesko favore al la centjara jubileo de Esperanto ili donu apogon al la Internacia Lingvo, kiel rimedon de internacie intelekta interŝanĝo, precipe por scienc-teknika progreso de la evolulandoj.

3-ano Tonkin deklaris kvin personojn, kiuj faris grandan kontribuon al la Esperanto-movado, kiel honorajn membrojn de UEA. Ili estas: Tibor Sekelj, Jugoslavio, Yuiko Isobe, Japanio, Ye Laishi kaj Zhang Qicheng, Ĉinio kaj Katherine L. Schulze, Usono.

3-ano Tonkin esprimis sinceran dankon al la gastoj de ĉina registaro kaj organizoj kaj al ĉiuj membroj de Honora Komitato de la

71-a UK pro ilia subteno al la kongreso.

Vicprezidento de LKK, Chen Yuan transdonis la kongresan flagon al prezidanto de LKK de la 72-a UK s-ano Stanislaw Swiatczak el Pollando, ĉar la venonta UK okazos en naskiĝlando de d-ro Zamenhof, kreadinto de Esperanto. Post disdono de buketoj diris s-ano Tonkin la fermaĵajn vortojn kaj la kongreso finiĝis triumfe, akompanate de la ĥore kantita Esperanta himno.

- - - - -

### Ĉinio kaj Esperanto - reciprokaj esperoj.

La 71-a UK klare montris, ke Ĉinio estas la plej granda espero de Esperanto, samkiel la Zamenhova lingvo estas unu el la ĉefaj esperoj de la evoluanta, malkliŝe pensanta, revolucia Ĉinio.

La 71-a UK estis sendube ankaŭ unu el la organizoj plej malfacilaj kongresoj, ĉar venis duoble pli granda nombro de aligintoj ol oni atendis, malvastis la kongresejo, menkis vasta akceptejo kun ĉiuj necesaj ĝicetoj, sperto pri tiel amasa evento ktp., ktp., aliflanke miloj da ĉinoj unuafoje utiligis Esperanton, pluraj dekoj da miloj da ĉinoj unuafoje audis pri ĝi, esperantistoj fine portis al Ĉinio la tutan miraklon de la zamenhova lingvo kaj homa digno sur la kampo de interpopola interkompreniĝo. Ĉar la movado ja ne konsistas el dorlotitaj turistoj, sed el enoj de revolucia "diligenta kolegaro", ili agnoskis la 71-an UK plena trafiko kaj brila sukceso, kiu pruvis la tutmondecon de Esperanto.

Ĉina gazetaro kaj UK: 109 ĵurnalistoj partoprenis la kongreson. La ĉefaj pekinaj ĵurnaloj unuapage okulfrapaj raportis pri la inaŭguro, la Centra Televidstacio elsendis novaĵojn pri ĝi same kiel Radio Pekino por en- kaj eksterlandaj auskultantoj. Faritaj kaj aperigitaj estis multaj intervjuoj kaj la 30-an de julio, sur alarmaj turoj de la Granda Muro raportistoj de la Pekina TV haste filmis grimpantajn esperantistojn kaj ties diversajn aktivecojn. Ne mankis flirtantaj verdaĵoj. Ili kreas TV filmon titolitan "Verdstela Esperantujo". Entute estis publikitaj 110 artikoloj kaj informoj. De la ĉina Novaj-agentejo transprenis koncernajn informojn ankaŭ ĵurnaloj en Hongkong kaj Aŭmeno kaj ek landoj de sudorienta Azio. La raportoj de la ĉina gazetaro pri la UK vekis ĉe la publiko grandan interesecon pri Esperanto, ĉar pli ol 2 mil kongresanoj en 54 landoj sengene interperolis pri amikeco kaj faris kulturan interŝanĝon en la sama lingvo Esperanto, kio aparte interesis ĉinojn. Ĵurnalistoj proprekule vidis rolon de Esperanto kaj iuj eĉ postulis tuj lernolibrojn kaj vortarojn.

Laŭ El Popola Ĉinio 11/86, Esperanto 9/86, Heroldo de Esperanto 10-12/86  
kompilis H.Štruncová

### K O N G R E S A - J   R E Z O L U C I O J

-- Rezolucio por Esperantistoj /movada alvoko/ --

La 71-a Universala kongreso de Esperanto, okazinta de 27-a julio



gis 2-a aŭgusto 1986, en Pekino, kun 2 482 kongresanoj el 53 landoj, esprimante sian kontenton, ke la kongreso ne nur estis la plej granda internacia aranĝo gis nun okazinta en Ĉinio, sed ankaŭ la plej granda Esperanto-kongreso ekster Eŭropo, konstatante, ke en Ĉinio kreiĝas nova potencialo de la nuntempa Esperanto-movado, gratulante aparte la ĉinajn esperantistojn pro iliaj multflankaj kontribuoj al la internacia Esperanto-movado generale kaj al la kongreso specife, alvokas al ĉiuj landoj kaj fakaj asocioj subteni laŭ siaj ebloj la movadon en Ĉina Popola Respubliko kaj en aliaj aziaj landoj, precipe per disponigo de rimedoj por praktika utiligo de la lingvo, substrekas, kunlige kun la supra alineo, la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fakaj kampoj, kaj reapelacias al la landaj asocioj digne omaĝi la centjaren jubileon de Esperanto per organizado de apartaj jubileaj kunvenoj, aranĝoj, eldonaĵoj, ekspozicioj kaj aliaj aĝedoj.

-- Rezolucio por eksterstarantoj --

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de 27-a julio gis 2-a aŭgusto 1986, en Pekino, kun 2 482 kongresanoj el 53 landoj, traktinte kiel kontribuon al la Internacia Jaro de Paco la kongresan Temon "Interkomprenigo, Paco, Evoluo", emfazas la bezonon de efika internacia lingva komunikado en spirito de egaleco por interkomprenigo de diverslingvanoj kaj homoj kun malsamaj mondkonceptoj, elsterigas la fakton, ke progreso de la homaro en la materia, socia, kultura kaj teknika evoluoj eblas nur sub kondiĉoj de daŭra kaj stabile paco bazita sur plene interkomprenigo, notas kun kontento la favoran ehon kaj subtenon, kiun trovas la kongreso flanke de ĉinaj aŭtoritatoj en la registaro kaj en politika, kultura kaj scienca rondo, substrekas la fakton, ke la internacia lingvo Esperanto povas efike kontribui al la pliprofundigo de la ligoj inter aziaj landoj kaj Azio, kaj aliaj kontinentoj, kaj alvokas al la registaroj, ke surbaze de la Rezolucio Res 23/11. 11 de Unesko favore al la centjara jubileo de Esperanto ili donu apogon al la internacia lingvo kiel rimedo de internacia intelekta interŝanĝo, precipe por la scienc-teknika progreso de la evolulandoj.

La 42-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Israelo, lernej-vilago Neurim, de la 14-a gis la 21-a de aŭgusto 1986.

Pro politikaj, geografiaj kaj aliaj obstakloj partoprenis en ĝi nur 105 homoj el 20 landoj. Oni akceptis novan landan sektion, USEJ - Usona Esperanto-Junularo. Tamen pro manko de kvorumo devas okazi postaj voĉdonoj pri ĉiuj decidoj, inkluzive rezoluci-proponoj.

/HdE 13/86/

# IFEF-kongreso SKOPJE



## 38-a IFEF-kongreso en Skopje

En la tagoj 16.-23.5.1986 okazis en Skopje /Jugoslavio/ tradicia, jam la 38-a kongreso de Internacia Fervojoista Esperanto-Federacio /IFEF/.

Skopje estas ĉefurbo de Socialisma Respubliko Makedonio, la plej suda respubliko de Jugoslavio, centro de politika, ekonomia kaj kultura vivo de Makedonio. Al la ĉijara kongreso aliĝis 715 partoprenantoj el 18 landoj.

Sabaton, la 17-an de majo ariĝis la kongresanoj unuan fojon en la kongresejo por partopreni interkonan vesperon, renkonti malnovajn kaj trovi novajn amikojn. Dum la vespero ludis kaj kantis konata makedona ensemblo de hispan-amerikaj kantoj "MAGNIFICO".

Dimanĉe matene pli ol cent kongresanoj partoprenis la ekumenan diservon, celebrita de mr Franjo Gruic, sacerdoto el Gakovo, Kroatio.

La kongreso estis solene inaŭgurita kaj malfermita dimanĉe je la 10-a en solene dekorita kongresejo. La inaŭguron krom menciitaj delegitoj kaj partoprenantoj el 18 landoj partoprenis multaj oficialaj gastoj, inter ili urbestro de la urbo Skopje Jugoslav Todorovski, vicprezidento de Jugoslavia federacia komitato por transporto kaj komunikado Pavo Radenović, prezidento de Centra komitato de sindikato de trafiklaboristoj Zdenko Pavletić, nome de Unuigo de Jugoslaviaj fervojoj membro de ĝia Afergvidata komitato Irajko Penev, nome de FISIAC Gustav Hutmacher el FRG kaj aliaj. Ili ĉiuj salutis la kongreson, dezirante sukcesplenan laboron kaj agrablan restadon en Skopje, akcentante samtempe unikan valoron de Esperanto, kiu kunigas, interalie, fervojistojn el la tuta mondo. Ankaŭ reprezentantoj de 18 partoprenantaj landaj fervojistaj asocioj kaj sekcioj salutis la kongreson. La prezidento de IFEF Joachim Giesner el FRG poste per instiga kaj emfaza festparolado malfermis la kongreson. Krom alia li diris, ke estis bona ideo elekti guste urbon Skopje kiel kongreslokon. Post terura tertremo en 1963 grandparte detruita, ĝi estis per neimageblaj helpklopodoj neciaj kaj internaciaj restarigita, pro kio ĝi farigis "Urbo de internacia solidareco". Ankaŭ multaj esperantistoj tiam partoprenis en la helpado.

La prezidento plue akcentis, ke la ĉijara kongreso okazas en aparte grava jaro, kiu de la Unuigintaj Nacioj estas proklamita Jaro de Paco. Kaj ni fervojistaj esperantistoj en duoble maniero praktikas tion, kion la proklamo postulas: profesie ni ĉiutage pace laboras por bonfartigo de la homoj, kaj kiel esperantistoj ni sendube kaj tre intensive agas samdirekte. Nia konata slogano "Fervojoj ligas landojn, Esperanto popolojn" ne estas nuraj vortoj, sed tre-

fa priskribo de la esenco de nia fervojista Esperanto-movado. Ĉiu esperantisto estas samtempe batalanto por tutmonda paco. La gravecon de tiu duspura agado LAA deziris substreki per aparta kongres-slogano "Fervojoj kaj Esperanto - pontoj de paco". Ĉiu esperantisto kapablas kaj strebas kunhelpi al granda celo de paco. Antaŭ la venontjare okazonta signifoplena jubileo de la esperantismo por ni povas ekzisti nur unu ĉefcelo: mobilizi ĉiujn fortojn por kunhelpi en la klopodado de ĉiuj bonvolemaj homoj. Ni ĉiuj devas strebi por plenpaca kunekestado, por malmaltraktado kaj por sennilita estonteco, por certigi pacon sur la tero."

Tiucele estis dum la kongresaj traktadoj proponita kaj la 20-an de majo 1986 unuanime akceptita "Mesago de paco".

En la priskribita etoso okazis ĉiuj kongresaj kunvenoj kaj aliaj programeroj.

Dum rondveturo tra la urbo Skopje dimanĉe posttagmeze ni unue veturis per aŭtobusoj al urba kvartalo Karpoš, kie estis inaŭgurita nova strato "Esperanto" fare de IFEF-prezidanto J. Ciessner. Dum la vizito de monumento de makedona popola heroo Goce Delcev, ĉiuj landaj reprezentantoj metis ruĝajn diantojn sur lian tombon. Poste ni en grupoj kun E-ciceronoj travisgerdis la urbon kaj ĝiajn plej gravajn vidindaĵojn: fortikaĵon kale, Ŝtonan ponton, malnovan komerc-kvartalon Ĉarsija, en kies kadro troviĝas "Bit-pazar" /malnova bazaro/, banejon de Daŭt-paseo, moskeon de Mustafa-paseo kaj la preĝejon de Sankta Savanto. Krome ni vizitis per aŭtobusoj restaĵojn de antikva urbo Skupi, kiu pereis en katastrofa tertremo en la jaro 518. Antaŭ tiu katastrofo Skupi estis belega urbo kun pluraj marmoreaj palacoj, fontenoj, placoj, publikaĵ banejoj kaj aliaj konstruaĵoj. Dum la dua duontaga ekskurso mardon, la 20-an de majo posttagmeze ni veturis per aŭtobusoj unue viziti restaĵojn de urbo Stobi /145 km for de Skopje/. Multaj restaĵoj el antikvaj tempoj altiris nian atenton: Dioceza preĝejo, diversaj palacoj kaj granda amfiteatro, devenantaj parte el la 4-a jarcento de nia erao. En urbeto Kavadarci oficiale akceptis kongresanojn urbestro Oligor Dubrov. Ankaŭ en agrokombinato TIKVES en konata vin-regiono Tikvesija akceptis nin direktoro Nikola Parakeov kaj prezidanto de Socialisma unuigo komunuma Dime Demjanov. Post mallonga kulturprogramo folkloro ni vizitis parton de la kombinato kaj unu el la plej grandaj vinkeloj, kie ni gustumis poste altkvalitajn makedonajn vinojn /tutcerte naturaj/.

Lunde post nepublika kunsido de IFEF-estraro kaj komitato delegacio de IFEF-kongreso estis akceptita de Aleksandar Varnaliev, ĝenerala direktoro de Fervoja Transport-organizo "Skopje".

Dum alia akcepto por IFEF-estraro kaj reprezentantoj de la 18 partoprenantaj landoj, mardo posttagmeze en la urbdomo de Skopje, la ĉefurbestro, dipl. ing. Jugoslav Todorovski substrekis sian apartan gojon kaj honoron pro renkontiĝo de diverslandaj reprezentantoj parolantaj la saman internacian lingvon.

Dum tutaga ekskurso ĵaŭde ni unue veturis per speciala trajno al Kiĉevo, de kie ni daŭrigis per aŭtobusoj al Chrida lago. Ohrida lago estas la plej granda kaj pitoreska el tektonaj lagoj kaj kune kun urbo Ohrid ĝi estas sub protekto de Unuigintaj Nacioj. Ĝi havas surfacon de 384 km<sup>2</sup> kaj profundas 286 metrojn. Ĝia dolĉa akvo estas tre pura kaj travidebla ĝis 80 metroj profunden. Post banado

kaj bongusta tagmanĝo en unu el lagbordaj restorecoj en ĝia suda parto ni veturis al urbo Ohrid, antikva urbo el romana epoko, la plej rica trezorejo de kulturo en Makedonio. Ni vizitis pregejon de Sankta Sofio el 10-a kaj 11-a jarcentoj kun multaj freskoj, restaĵon de fortikaĵo Gorni Sarajj, bazilikon de Sankta Klimento, ekzilito el Morevio /CSSR/, kiu ĉi tie establis la Unuan altlernejon kaj estigis episkopo fine de la IX jarcento kaj aliajn memoraĵojn.

El la "faka" programo oni devas mencii kunsidojn de Terminara komisiono, kie oni traktis la staton de traduklaboroj surbaze de LG III kaj preparon de materialo, kion UIC presigos en LG IV, kaj staton de laboroj por presigi en 1987 fakan fervojan terminaron. Dum faka prelego Gvozden Sredic prelegis pri Internacia transporta merkato de facile pereemaj varoj - Komuna aktiveco de europaj fervojoj en kadro de la societo INTERFRIGO - kun lumbildoj. Ankaŭ dum alia faka programo "Aktualaĵoj el mia lando" la partoprenantoj havis okazon ekscii kaj pere de lumbildoj vidi multajn interesaĵojn pri fervojoj kaj trafiko kaj plivestigis tiemanierajn fakajn sciojn.

El kulturaj programoj oni devas almenaŭ mencii Baledan vesperon, kiun prezentis membroj de Baledo de Makedona popola teatro, laŭ la melodioj de pluraj komponistoj. Dum Internacia balo ĉiuj partoprenantoj agreble amuzigis kaj dancis /eĉ makedonajn rondo-dancojn/. Folkloro vespero ravigis partoprenantojn per siaj programejoj de revaj makedonaj melodioj, kantoj kaj dancoj.

Kvankam la kongreso vendredon la 23-an de majo vespere oficiale finiĝis per solena fermo, plimulto da partoprenantoj el Jugoslavio ne forveturis. Multaj partoprenis postkongresajn ekskursojn, aliaj uzis eblecon vojaĝi senlime tra Jugoslavio helpe de senpaga fervoja bileto, valida por la 1-a klaso de ĉiuj trajnoj sur la linioj de Jugosleviaj Fervojoj de la 5-a de majo ĝis la 8-a de junio 1986, kiun ricevis ĉiu partoprenanto de la kongreso. Nia grupeto post ĉiunokta veturo per trajno /kun dormado tie/ vizitis unue norĝan parton de Jugoslavio, restante duontagon en urbo de multaj orajistoj, pura kaj bela Zagrebo, poste ni estis dum unu tago en Split, kie ni banis nin en sufiĉe pura, sed lomete malvarma marakvo /kia diferenco kompere al varmeta, dolca kaj brile travidebla akvo en Ohrid/, vizitis per marsipo belan adriatikan insulon Korĉula, por ke ni poste post tutnokta veturo per trajno alveturu al ĉefurbo Beograd. Tie ĉi unuan fojon dum nia restado en Jugoslavio atendis nin pli longe daŭranta pluvo, tamen ni post fino de pluvado trarigardis kun akompano de jugoslavia kolego parton de la urbo, iujn elstarajn konstruaĵojn kaj vizitis la konstan bazaron, kie oni povis aĉeti praktike ĉion. Kiel ĉi tie, tiel ankaŭ en aliaj lokoj ni estis surprizitaj ne nur per altigantaj prezoj, sed ankaŭ per ilia varieco. En diversaj lokoj estis ankaŭ diversaj prezoj, ekzemple koloraj bildkartoj kostis 10 ĝis 50 dinarojn po ekzemplo, prezo de ovo estis 20 ĝis 40 dinarojn, 1 kg da fragoj kostis 200 ĝis 500 dinarojn ktp. Dum lastjare kostis sĉibileto el Split al insulo Korĉula 900, ĉi-jare en majo jam 1 400 dinarojn, dum lastjare oni pagis por tranoktado ĉe privatuloj proksimume 500 dinarojn por nokto kaj po persono, ĉi-jare jam 1 000 dinarojn. Similajn ekzemplojn oni povus citi multajn, plej okulfrapa tio estis en bazaroj.

Tre kontentaj kaj kun multaj impresoj kaj rememoroj ni adiaŭis Jugoslavion, novajn kaj malnovajn amikojn kaj konatojn. Multaj el

(Fino sur la paĝo 28)



Prezidanto de IFEF Joachim Giessner inter anoj de LKK kaj aliaj kolegoj dum solena inaŭguro de la nova strato "Esperanto" en Skopje



Al la partoprenantoj de la Esperanto-seminario en Prerov sabate la 15-an de novembro bele kantis infana horo Přerováček estrata de O. Šiška kaj D. Dudová.



# FOTO-KRONIKO





La Esperanto-ekspozicio en Tábor honore al la Jubileo de Esperanto estis tre sukcesa

# ALVOKO

La partoprenantoj de Esperanto-seminario en Přerov la 15-16-an de novembro 1986 alvokas ĉiujn pacamajn esperantistojn ne nur en Ĉeĥoslovakio, sed en la tuta mondo, sendepende de nacia, religia, rasa kaj socia apartenoj, aktive partopreni en batalo kontraŭ la nuklea vetarmado.

La partoprenantoj postulas:

- unue - strikte malpermesi plujajn nukleajn provojn laŭ la proponoj de Sovet-Unio,
- due - pli aktive batali kontraŭ la militismigo de la kosmo,
- trie - likvidi ĉiujn provizojn de nukleaj, kemiaj kaj alispecaj armilaroj.

Estas krimo kontraŭ la homaro misuzi naturprovizojn de ĉiu ajn energio, de la riĉaĵo de nia planedo, por militpreparaĵ celoj, elspezi la nacian enspezon por rimedoj, kiuj neniiĝos ĉion vivantan sur la Tero. Nur frenezulo povas kredi, ke post la ne tria, sed la lasta monda atomilito iu transvivos.

Anstataŭ ligi amikeckontaktojn inter ĉiuj landoj, oni semas malamikecon inter popoloj.

Neniam forgesu milionojn da viktimoj de la dua mondmilito kaj terurajn guinigojn post ĝi.

Antaŭ la homaro staras aktuala forta minaco, danĝerigo de la mondpaco, per la plej agresemaj imperiismaj ŝtatoj, kiuj realigas politikon de superarmado kaj konfrontado. Tion ankaŭ pruvas la malsukcesa renkontiĝo en Reykjavik, kie usona prezidento rifuzis ĉiujn pacproponojn de K-do Gorbaĉov.

Ĉiu devas konscii, ke ni vivas sur unu planedo kaj ke viyo sur ĝi ne eblas sen kunekzistado kaj kunlaboro de ĉiuj landoj. Laŭvorte oni nun forĵetas monon por nenigi unu la alian, anstataŭ ke ĉiuj strebu komune serĉi rimedojn, kiel solvi diversajn problemojn, kiuj danĝerigas homaron, p.e. senlaboreco, malsanoj, malsatmorto, natur-elementaj katastrofoj kaj kreskanta manko de ĉiuspecaj energioj.

Se oni tuj ne ĉesigos kun atomproveksplodoj, povas okazi, ke foje venos tago, kiam nia komuna planedo disfalos je milionoj da pecoj kaj la tuta homaro pereos samtempe kun ĝi.

Alproksimiĝas la centjara jubileo de ESPERANTO. Ĉiuj esperantistoj laboru por interkompreniĝo en la mondo. Uzu la internacian lingvon ne por propra utilo kaj plezuro, sed por komuna celo kaj tiel plenumu la testamenton de kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof.

---

## rezolucio

---

Enkadre de la Konferenco de Junulara Sekcio de ĈEA okazinta de la 10-a ĝis la 12-a de oktobro 1986 en Blansko, konekse kun la Internacia Jaro de Paco, la partoprenantoj el diversaj landoj (ĈSSR, GDR, Pollando) konstatas, ke konservado de paco estas la plej grava kaj aktuala problemo de la nuntempa homaro.

La Konferenco konsideras, ke nur multflanka reciproka malarmado povos plifirmigi la pacon en la tuta mondo, kio estas la necesa

kondiĉo por kunsolvi aliajn globalajn problemojn, ĉu ekologiajn, ekonomiajn ktp.

Oni postulas, ke la moratorio pri nukleaj testoj far Sovet-Unio ne restu unuflanka, des pli, kiam la kontrolo estas scienc-teknike ebla.

La partoprenantoj opinias, ke la tradiciaj politikaj metodoj nur malfacile nuntempe kongruas kun aktuala situacio en internaciaj aferoj ekonomia kaj politika kaj proponas al la popoloj kaj registaroj, ke oni klopodu adopti novan konvenan pensmanieron kaj agadmetodon bazitan filozofie sur demokratio kaj humanismo.

Ĉeĥa Esperanto-Junularo opinias, ke internacia kompreniĝo pere de neutrala internacia lingvo estas grava paŝo survoje al certigo de tutmonda paco.

Akceptita en Blansko, ĈSSR, la 12-an de oktobro 1986.

---

---

# Rondeta vivo

---

---



**Havířov.** En la monato de ĉs.-sovetia amikeco prelegis 20.11.1986 Jarmila Pastrnáková pri sia vojaĝo al Leningrado. Pro la sama kazo estis aranĝita ekspozicio de korespondaj kaj publikaĵoj el socialismaj landoj en Společenský dům. Ĝi daŭris tri semajnojn. La 11-an de decembro ceestis Drahomír Kočvara el Ostrava kaj rakontis pri sia restado en Rumanio. Ĉe ankaŭ paroladoj estis prezentitaj belaj diapositivoj.

**Tábor.** En la antaŭjubilea jaro de centjara datreveno de Esperanto aranĝis E-klubo de Urba kultura centro en Tábor kelkajn agadojn. Ekz. ili aranĝis Renkontigon de sudbohemiaj esperantistoj, Esperanto-balon kun la esperantista musik-grupo "Barbuloj" kaj precipe grandan Esperanto-ekspozicion, kiun vizitis multaj taboranoj. En januaro 1987 la ekspozicio estis instalita en České Budějovice, kien ĝin pruntedonis la E-klubo en Tábor.

**Třebíč.** La esperantistoj el Třebíč estas ĉiam pli agemaj. Ilia granda ĉiujara arango - la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov - estas vaste konata. Sed ili famigas ankaŭ per kreskanta eldona agado. Por SET ili aperigis ĉiujn necesajn lernilojn kaj nun ili preparas eldonon de la elementa lernolibro de prof. Kilian, novajn lernilojn de M. Malovec, kaj nome: Gramatikon de Esperanto, Ekzercaron al la lernolibro ABC, Junan korespondanton kaj Fabelojn. Ĉiuj ĉi verkoj estas aperontaj dum la nuna jaro. Krome ili intencas eldoni Fabelojn de K. Čapek en traduko de J. Vondroušek, alumetujajn glumarkojn (5 specojn) kaj afiŝon al la centa datreveno de ak. pentristo Kramlíček.

**Znojmo.** EK Znojmo aranĝis la 11-an de decembro 1986 vesperon omaĝe al d-ro Zamenhof. La programo konsistis el parolado pri Zamenhof, ekspozicio de E-libroj kaj bildkartoj pri Japanio. Pri la vojaĝo kaj restado en Japanio parolis s-ano Jeromír Polák. Tiu ankaŭ partoprenis la mondan konferencen kontraŭ nukleaj armiloj kaj la 75-an E-kongreson en Osaka. Lia rakontado pri la vojaĝo estis tre interesa, kaj same la rakontado pri la renkontigo kun japanaj esperantistoj. Estis samtempe prezentita 500 lumbildoj el Japanio, kiuj tre plaĉis al la klubanoj kaj gastoj.

## ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

---

Eddo: Kuraĝon vi havus;  
ho, ke vi havu ankaŭ saĝon!  
Ne atingos venkon  
ĉe kiu sprito mankas.

### Enkonduko

Ofte oni povas legi en gazetoj, ke sinjoro X estis atakita. Unu aŭ pli multe da atakantoj lin prirabis, vundis aŭ eĉ mortigis. Se ni interesiĝas pri la afero pli detale, ni plejofte povas konstati, ke la atakito suferis malvenkon antaŭ ĉio tial, ke li ne havis eĉ la plej bazajn sciojn kaj scipovojn, kiel defendi sin. La atakantoj estas ordinare homoj psiĥe nevaloraj, diversaj kontraŭsociaj individuoj, eĉiuloj k.t.p. Ne okazas ofte, ke batalas kontraŭ nin valora kontraŭulo. En niaj ĝisnunaj verkoj ni klopodis atingebliĝi ĉiujn informojn necesajn por la interesatoj pri majstre gvidata instruado, kies celo estas ricevo de praktika nevenkebleco en konfliktoj kun la personoj, kiujn oni ordinare komprenas sub la nomo specialisto, tio estas majstroj de la juĵuĉuo aŭ karateo, kvalifikitaj boksistoj aŭ luktistoj k.t.p. Batalon kontraŭ laikon ni konsideris tiomgrade facila afero, ke entute ne necesas okupi sin pri ĝi. Male, en tiu ĉi libro ni konsiles al laiko, kiel batali kontraŭ laikon. Memkomprene, tiu, kiu trastudos kaj traekzercos la materialon enhavatan ĉi tie, ne plene estos laiko laŭ nia kompreno de la vorto, ĉar li jam ricevis certgrade bazan instruon kiel batali. Li tamen ne estas efektiva specialisto kaj tial li estu modesta kaj singarda. Li sciu, ke ankaŭ plue estas pli bone eviti la sindefendo-situaciojn. Ne estas agrable esti vundita fare de iu psiĥopato kaj finfine ne estas agrable mem malbonfari al iu. La temo ĉi tie klarigata estas la minimumo, kies scio estu memkomprena por ĉiu homo pli ofte endanĝerigata en la situacioj, ĉe kiuj li devas defendi sin mem, siajn kuncivitanojn aŭ sian havaĵon. Doni pli multe tiu ĉi libro de povas kaj eĉ ne klopodas.

La aŭtoroj  
januaro 1969

## Unua parto - enkondukaj notoj

### 1.1. Du programoj

Studente la sindefendon, ni povas klopodi ekzemple atingi praktikan nevenkeblecon. Tiucelajn ekzercigadon ni nomas la majstra. Ĝi estas tamen eksterordinare postuliva kaj ne ĉiu povas ĝin trapasi. Ekzemple la nura perfekta ekrego de frapoj daŭras dek ĝis dek kvin jarojn de ĉiutaga intensa ekzercigado. Sed la sindefendo ne inkluzivis sole la frapojn kaj jam el tio oni povas akiri klaran imagon pri malfacileco de la lernado. Krome, la ekzercado sen bona sinpreparo en la ĵuĵucuo aŭ karateo estas preskaŭ neebla.

Dua ekstremo estas klopodo ellerni kelke da rimedoj, kiuj ebligas al ni laŭeble plej baldaŭ esence plialtigi nian ŝancon venki laikon. Tiel estas necese celumi la sindefendon en la armeo, polico k.t.p. La ekzercadon de tiu ĉi speco ni nomas reduktita kurso (de la sindefendo).

La supre menciitaj okazoj estas ekstretoj. Ordinare oni elektas inter ili ian kompromison. Kvankam oni ĝis nun preferis plejofte la duan alternativon, nome la reduktitan kurson, estas necese, ke estu pli multaj interesatoj pri la majstra ekzercigado. Alie malperas la ebleco de komparo, kaj sekve ankaŭ la klopodo atingi pli altajn rezultojn. La sindefendo poste povas facile descendi ĝis amatora nivelo, kaj kun efektiva sindefendo havas nur komunan nomon.

Rilate al tiuj ĉi ekstremaĵoj, kiujn oni povas inkludi en la studadon de la sindefendo, estas necese havi eblecon akiri ĉiujn bezonajn informojn. Tiu ĉi libro servu por pliprofundigo de la reduktita kurso.

Rilate al la intencata celo de la reduktita kurso oni devas eksigi el la ekzercigado ĉion, kio ne estas necese por batalo kontraŭ armitan aŭ nearmitan laikon. La tuta koncepto de la sindefendo devas esti pure celkonforma. Ellerni novan movon ne estas facile. Tial ni lernu sole la minimumon da batalagoj.

Ankoraŭ malpli facile estas resti en la sindefendo-situacioj malvarmsanga, kio necesas por ĝuste apliki niajn movo-sciojn. Tial ni dediĉis unu parton de la libro por klarigi, kiel la sindefendo-situacioj ekostas. La lerninto de la reduktita kurso scios, kiel aŭ eviti iujn sindefendo-situaciojn, aŭ solvi ilin tiam, kiam tio estas avantaĝa por li.

### 1.2. Kio estas kaj kio ne estas sindefendo

Se oni parolas pri io ajn, ĉiam estas oportune interkonsenti tuj komence pri la senco de la uzotaj bazaj terminoj. Alie povas facile ekesti miskomprenoj. Unu el la bazaj terminoj de la sindefendo estas la sindefendo-situacio.

Kiel rezultas jam el la termino, temas pri la situacioj, en kiuj ni devas iel defendi nin kontraŭ perforton, kies iniciantinto estas alia homo. Tamen tio ne sufiĉas. Se interbatalas du ebruuloj aŭ se luktas du sportistoj, ĵudistoj, karateistoj aŭ boksistoj, ili ankaŭ defendas sin kaj frontas kontraŭ la perforton, kaj malgraŭ tio, oni evidente ne nomas tiujn ĉi situaciojn sinde-



fendaj. En la sindefendo-situacioj, la celoj de la batalo estas pli gravaj ol en la sporbatalo aŭ en pli malpli instinkta interbatigo de du ebruloj. Ni konsideras la situacion kiel sindefendan sole tiam, kiam la motivoj de la batalo etike pravigas nin batali, eĉ se ni scias, ke ni povas eventuale penigi la vivon de la kontraŭulo.

Tiu ĉi difino estas tre grava. Kiel sindefendo-situacion ni ne taksas - kiel ni jam diris - interbatigon, kiu evoluis el negrava kverelo k.t.p. En tiu ĉi okazo ne estis necese uzi la perforton kaj sekve ne estis pravigebla eventuala malprospero, kiun eble suferus unu el la batalantoj. Kaj aplikoj de ajna efika batalago ĉiam neeviteble kunportas tiun ĉi riskon.

La sindefendo-situacioj ne estas en la homa vivo oftaj. Ĉe tiu, kiu troviĝas en tiuj ĉi situacioj, aperas ordinare tre intensaj emociaj statoj (antaŭtimo, timo, kolerego, angoro,...). Oni solvas la situaciojn enkadre de instinktaj reakcioj (en ties homa formo), nome per la agreso, fuĝo, rigidiĝo aŭ pasivdefenda reakcioj. La apero de tiuj ĉi reakcioj memkomprene senvalorigas aŭ eĉ malebligas aplikon de la ellernitaj batalagoj kaj racian pripenson. Elimino de nedezirindaj psiĥaj statoj apartenas en la sferon de la t.n. mensa sinpropero. Tiu ĉi estas unu el la plej gravaj partoj de la sindefendo. En la reduktita kurso de la sindefendo oni memkomprene povas sole menciigi signifon.

### 1.3. Kio necesas por la solvado de la sindefendo-situacioj?

Unue estas necese havi sufiĉe da scioj kaj spertoj, por ke oni povu decidi pri situacio, ĉu ĝi estas aŭ ne estas sindefenda. Tio eble ŝajnas al iu memkomprene kaj facila. Sed ĉio ĉesas esti facila, se ni pripensis, ke la atakanto povas apliki neatenditan insidatakon. dume la defendanto ofte eĉ ne havas tempon ekkonscii, ke li jam troviĝas en la sindefendo-situacio.

Antaŭ ol ni komencas pensi pri solvado de la sindefendo-situacioj, necesas halti ĉe la termino "solvo de la sindefendo-situacio". Kion oni sub ĝi komprenas? Se ni iras nokte solaj hejmen kaj se ni estas insidatakitaĵ, verŝajne ne estos nia senpera celo eligi kontraŭulon en la plua batalo. Tute certe ni estus kontentaj, se la atakanto(j) ne batos, vundos aŭ mortigos nin. Oni povas atingi tion sendanĝerigante la kontraŭulon ekzemple per peza frapo. Sed laiko, kiu ne scipovas la pezan frepon, kaj eĉ eble ne havas sufiĉe da volo aŭ kuraĝo frapi homon, estus verŝajne kontenta eĉ tiam, se li sukcesas solvi la situacion vorte aŭ per fuĝo. En la sindefendo, kiu estas intencata unuavice por bezonoj de la neekzercitaj homoj, la sukcesa fuĝo aŭ venigo de helpo estas ankaŭ akcepteblaj solvoj.

Se oni ne povas fuĝi aŭ eviti la sindefendo-situacion, ne ĉiam el tio rezultas, ke oni devas, por venki kontraŭulon, scipovi iujn frapojn aŭ LUKTUMOjn (ROMPUMOjn, STRANGOLUMOjn, EVERTOjn k.t.p.). La atakanto estas sendanĝerigebla ankaŭ per ĵetita malmola objekto, oni povas bati lin per stango el barilo, per seĝo aŭ per libro trafanta lian kolon k.s. Tiujn ĉi rimedojn evidente konas ĉiu; malgraŭ tio sole nemultaj aplikas ilin en konvena momento kaj ĝuste. Ankaŭ uzo de tiuj ĉi rimedoj postulas adekvatajn takti-

kon kaj sperton.

La ĝis nun nomitaj rimedoj estas facile aplikeblaj de eĉ tute neekzercita homo. Se li havas sufiĉan tempon kaj intereson pri la ekzercigado, li bone ellernu almenaŭ iun efikan batalagon. Tiu ĉi sciopovo memkomprene povas la solvado de la sindefendo-situacioj ege simpligi. Estas granda diferenco, ĉu tute nesperta kaj neekzercita defendanto fidus sole tion, ke li sukcesas eviti la batalon aŭ sendanĝerigi la kontraŭulon per bato helpe de iu aĵo, aŭ ĉu li kapablas feri almenaŭ proksimume ĝuste iun frapon. Tio estas, kromalie, signifoplena por lia memfido, kio povas esti ofte decida.

El la karaktero de la efikaj batalagoj rezultas, ke neniam estas certe, ĉu aplikita frapo sole ĝenkonsciigos la kontraŭulon, sed ne plu grave malutilos lian senon aŭ ne mortigos lin. Ankaŭ falo teren post sukcesa frapo povas grave minaci la vivon aŭ la sanon de la trafito. Duflanke estas ja ankaŭ necese rimarki, ke la samo validas ankaŭ por ni. Certe estas prudente akcepti por la solvado de la sindefendo-situacioj la postulaton, kiu diras ke la rezulto de la batalo devas dependi pleje de la agado de la defendanto (tio estas la t.n. tria postulato de la sindefendo). Tial ajna senbezona hezito kaj plilongigado de la batalo aŭ uzado de nesufiĉe efikaj batalrimedoj estas neakcepteblaj kaj pligrandigas danĝeron de nia malsukceso.

Ajna batalago mem havas nur negrandan valoron, se oni ne scias, kiel apliki ĝin. Pri tio temas la taktiko. Per la taktikoj oni ekzemple nuligas la eblecon de neatendita atako fare de kontraŭulo, per la taktiko oni malhelpas la kontraŭulon, ke li profitu de sia nekontestebla fizika supereco k.t.p.

El nia ĉiutaga praktiko ni scias, kia estas diferenco inter la kono kaj la scipovo, kaj inter la konscio, kiel profiti de tiu ĉi kono aŭ scipovo, kaj ilia aplikado en konkreta situacio. Antaŭtimo, timo aŭ angoro povas kaŭzi, ke la defendanto ne havas kuraĝon frapi la atakanton en la momento, kiam tio eblas, kaj sekve de tio li fiaskas. Oni konas okazojn, kiam la defendanto, armita ekzemple per pistolo, estis mortigita fare de la kontraŭulo, kiu forprenis la pistolon de li. Montriĝas, ke mensa sinpreparo, kiu certigu la taŭgan mensan staton, estas por la solvo de altpretendaj sindefendo-situacioj absolute necesa. Sen ĝi estas la solvado de la sindefendo-situacioj malpli e-

LUKTUMO estas batalago, kiu ne havas karakteron de frapo. La luktumojn oni uzas ekzemple en la ĵudo aŭ lukto. La plej gravaj klasoj de la luktumoj estas EVERTOJ, ROMPUMoj kaj STRANGOLUMoj (12,13,18)(ĉ: chvat).

-I fari LUKTUMOn.

EVERTO estas batalago, per kiu oni ĵetas kontraŭulon teren (19)(ĉ: poraz).

-I ĵeti kontraŭulon teren per iu EVERTO.

ROMPUMO estas speco de LUKTUMO, per kiu oni celas aŭ teni kontraŭulon en senpova pozicio mispoziciigante liajn membropartojn reciproke aŭ rilate la trunkon, aŭ elartikigi lian membron aŭ ĝiajn partojn (12,13,19)(ĉ: paka).

-I apliki ROMPUMOn kontraŭ iun (ion).

STRANGOLUMO estas batalago, per kiu oni strangolas kontraŭulon. (12,13)(ĉ: škrceni).

-I apliki kontraŭ iun STRANGOLUMOn.

# POR LA JUBILEA FONDUSO

- K. Fremlová, Ostrava-Vítkovice  
M. Čerevková, Ostrava-Vítkovice  
P. Jančáková, O.-Vítkovice  
J. Folta, O.-Vítkovice  
A. Vojtek, O.-Vítkovice  
Z. Falkenauer, Třebíč  
J. Kovář, Česká Třebová  
MUDr. Foreštová, Poděbrady  
H. Linková, Dolní Bousov  
L. Panenková, Praha 8  
J. Karhan, Olomouc  
V. Slačarová, Hrabětice  
M. Plachá, Jihlava  
O. Kotrch, Příbram  
L. Koříšková, Příbram  
L. Fiala, Poděbrady  
Vl. Stibor, Hroslav  
L. Bury, Ostrava  
Vl. Rosypal, Třebenice  
K. Hrbotický, Archlebov  
Ing. V. Bauchnerová, Nová Paka  
St. Švec, Nové Město n.Mor.  
Fr. Šimánek, Mladá Boleslav  
J. Šourek, Jablonec n. N.  
PhDr. E. Spitz CSc., Karviná  
M. Lidická, Praha 4  
J. Holeček, Most  
M. Smělý, Prostějov  
J. Pařízek, Prostějov  
L. Pařísková, Prostějov  
K. Brychtová, Jihlava  
M. Kureová, Liberec 6  
J. Ryšavý, Uherský Brod  
A. Smídová, Trnávka  
O. Prokeš, Ostrava  
M. Trtíková, Brno  
L. Šebestík, Modřice  
E. Tichá, Čerčany  
J. David, Prostějov  
Ing. J. Novák, Mešice  
MUDr. L. Kreutzschman, Brno  
J. Zelová, Bystřice  
V. Kulíková, Mlázovice  
J. Tomíšek, Říkovice  
I. Stolinová, Česká Třebová  
J. Mareš, Jos. Dvůr  
M. Francová, Pardubice  
Fr. Plášek, Velké Losiny  
J. Trojan, Vokovice  
M. Petrová, Hradec Králové  
R. Tomiczek, Karviná  
J. Kobza, Praha 9  
MUDr. Vl. Harna, Olomouc  
K. a Z. Vysloužilovi, Vsetín  
A. Jančíková, Vír  
J. Sebel, Třebíč  
Ing. O. Barayosz, Havířov  
A. Klumpar, Česká Třebová  
M. Krupička, Volary  
Ing. M. Švejsová, Brezno  
Ing. J. Široký, Dolní Bělá  
Rodina Hrbáčková, Mladá Boleslav  
B. Toman, Prostějov  
K. Topinka, Most  
J. Borský, Nahořany n. Metují  
L. Chytil, Přerov  
J. Suchánek, Ostrava  
L. Hluchý, Hrob  
L. Začral, Olomouc  
J. Vano, Most  
Fr. Roubec, Třebíč  
I. Solovská, Nová Hradečná  
St. Linhart, Pardubice  
M. Srbek, Bášt  
P. Minář, Dvůr Králové  
P. Soušek, Olomouc  
Ant. Mašata, Prachatice  
J. Tyslpret, Kardašova Řečice  
St. Kyncl, Miletín  
J. Vondráková, Přerov  
A. Stavělová, Holešov  
Ing. Jan Kudrnovský, Příbram  
M. Šafránek, Praha 1  
M. Šochová, Dobříš  
M. Ronneforsová, Česká Skalice  
O. Nováková, Beroun  
M. Hřčková, Kopřivnice  
J. Vyhlídal, Ostrava  
K. Petrů, Horoměřice

---

---

# Efektive okazis

Venis al mi letero bele afrankita de turkaj poŝtmarkoj. Dum Esperanta kunveno mi tralegis enhavon de la letero kaj volis scii opinion de aliaj geklubanoj, ĉu akcepti turkan esperantiston, kiu bezonis en nia urbo unu tranokton dum sia vojaĝo tra 17 landoj. Preskau ĥore mi audig: "Ho, jes, akceptu lin kaj venigu lin en nian klubon. Ni ankoraŭ neniam parolis kun turko, ni konas ilin nur de orientalaj filmoj."

Do, mi respondis jese. Venis destinita tempo kaj mi atendis kvar horojn en ĥalo de la stacidomo, ĉar en tiu tempo estis malfruigintaj preskau ĉiuj trajnoj. Mi atendis kun pli granda mansako, sur kiu estis granda Esperanta stelo. Neniu venis, eĉ niaj geklubanoj atendis vane.

Post 10 tagoj mi estis preparita gvidi 14-personan grupon al Esperantista renkontiĝo en urbon Jablonec en norda Bohemio, kie mi-aj Esperantaj infanaj gelernantoj volis prezenti teatraĵsceneton dum Ĵikolao-vespero. Du horojn antaŭ nia forveturo iu eksonorigis. Antaŭ la domo staris nekonata sinjoro kaj diris: "Mi estas J. J. el Turkujo. Mi ne havis eblecon veni antaŭ 10 tagoj."

"Ho, mi bonvenigas vin, sed - mia dio - kion mi nua faros kun vi, kiam ni post eta tempo forveturos. Lasi vin ĉi tie? Ne eblas. Vi devos veturi kun ni. Antaŭmendi tranokton por vi ankaŭ jam ne eblas, do ni kunprenos blovmatracon kaj dormosakon kaj vi dormos sur la planko de nia ĉambro en studenta hejmo."

Esperantista renkontiĝo okazis en ĉarma medio, nia infana prezentado sukcesis kaj turka samideano estis ravita, ĉar multaj volis kun li persone konatiĝi. Nokte en negranda 4-lita studentĉambro nia laca turka gasto baldau ekdormis kaj komencis tre laute ronki. Kion fari? Ankaŭ aliaj volis dormi. Mi tuŝis lin, por ke li turnigu kaj ne ronku. Senvorte li tion faris. Matene dum promenado tra la urbo li demandis min per kortuŝa voĉo: "Kion vi nokte deziris de mi?"

jary

Karaj amikoj, ni malfermas novan rubrikon en nia modesta revuo. Dum via esperantista agado vi certe travivis amuzajn aŭ nervostreĉajn aventurojn kaj eventojn. Estas via tasko ne lasi ilin nur por vi, sed sciigi ilin ankaŭ al niaj legantoj. Ni estas konvinkitaj, ke viaj humuraj kaj amuzaj travivaĵoj riĉigos nian revuon kaj faros ĝin pli leginda. Ni esperas, ke vi amase kontribuos al nia rubriko per tekstoj koncizaj kaj interesaj, ne pli longaj ol unu tajpita pago. Ni volas montri, ke esperantistoj estas ne nur seriozaj lingvistudentoj kaj peĉbatalantoj, sed ankaŭ homoj gajaj, amikaj, iam eraremaj, tamen homoj normalaj. Ni ĝojatendas viajn kontribuojn, kiujn vi ne devas subskribi per via nomo, same kiel faris nia samideano "jary". Ni deziras al vi multajn sukcesojn.

Via redakcio.

# KONVERSACIO por progresintoj



Sesa temo: A M U Z O J

En la teatro estas antaŭ rigardantoj aŭ spektantoj scenejo, kiu situas pli alte. Sur ĝi la geaktoroj dialogas, monologas, mimitikas kaj gestas. Iam ili ankaŭ kantas aŭ havas maskojn sur vizaĝoj. Ili agas inter kulisoj kaj rekvizitaĵoj. Laŭ la nombro da geaktoroj varias scenoj en unu akto. Dum la paŭzo inter aktoj la kurteno kaŝas la scenejon kaj oni ŝanĝas kulisojn kaj rekvizitaĵojn. Antaŭ la scenejo estas suflora budo, sufloro sufloras la tekston al geaktoroj. Por muzikado dum iuj teatraĵoj estas tie orkestro. En kelkaj scenejoj aperas marionetoj aŭ pupoj. Tiujn movas kasitaj homoj, per ŝnuroj, dratoj aŭ fingroj. Nuntempe oni konas eĉ aliajn metodojn kaj eluzas multajn teknikaĵojn por vekti iluzion de realeco sur la scenejo. Spektantoj sidiĝas sur seĝoj, en logioj aŭ staras sur galerio. Post la bona teatraĵo ili aplaudas, la geaktoroj dankas kaj riverencas, post malbona teatraĵo ili fajfas, brugas kaj ĵetas ion. Dum la akto la rigardejo estas senluma. Teatraĵon aŭ dramon skribis verkisto, iam oni dramigis libron. Komponisto komponis muzikon al opero, opereto aŭ muzikalo. Reĝisoro destinas rolojn al geaktoroj. Tiuĵ elĉerpiĝas tekston dum pluraj ekzamenadoj kaj provoj sub la direktado de reĝisoro. Poste estis prezentadoj, la premiero estis plej solena. En opero estas ludata plej ofte antaŭ ĉiu akto uverturo.

En kino estas antaŭ senluma rigardejo granda ekrano blanka el tolo kaj alia materialo, sur kiu kamero projekcias filmon el celuloida bendo. La scenojn de la filmo turnis antaŭe reĝisoro kun kameristo, multaj vivaj geaktoroj kaj aliaj helpantoj. La scenoj estis per la kamero fakte fotografataj, oni feris grandan vicon de tiuj fotoj, la ŝanĝoj en ili estas apartigitaj, sed la okuloj dum projekciado ne kapablas apartigi la ŝanĝojn kaj havas iluzion de kontinua movado. Krome ekzistas diversaj trukoj, la kamero povas filmi en nenormala vidangulo, diference rapide, oni povas uzi desegnajojn, marionetojn aŭ pupojn. En tiuj kazoj estas animatoroj, kiuj apartigas movojn. Filmaj kaj projekciaj metodoj estas tre diversaj. Filmo ekestas en kunlaboro de verkisto, kiu verkis scenaron, kun reĝisoro, aktoroj, kameristo kaj aliaj laborantoj, kiuj estas nomataj en la titolo. Scenojn oni filmis en atelieroj inter kulisoj aŭ ekstere, en alia vico, ol ili estos projekciataj. Kelkajn scenojn oni eĉ ellasas en kunteondata celuloida bendo. Oni filmis enhavojn de multaj libroj.

Varieteo estas entrepreno, kie oni prezentas malgrandajn scenojn, kantojn kaj sercojn. Plej ofte oni povas tie ankaŭ manĝi kaj trinki. Kabaredo estas prezentado de tia tipo en varieteo aŭ aliloke. Kantistoj kantas kanzonojn, kiuj estas dum certa tempo tre



ŝtataj. Kelkaj scenoj okazas nur per mimiko de vizaĝo aŭ gestoj de korpo, tio estas pantomimo. Pantomimo de pluraj dancantoj kun muziko estas baleto. Aliaj artistoj faras akrobataĵojn, burleskuloj, klaŭnoj aŭ arlekenoj havas multkoloran nenormalan veston kaj ridiĝas recipie per sia ŝajna mallerteco. Sorĉistoj kaj magiistoj sugestias, hipnotas kaj faras aliajn tre lertajn kaj admirindajn trukojn. Dresuristoj montras dresuritaĵajn bestojn. Cirko estas granda tendo, kie oni el mezo prezentas akrobatojn, dresuristojn, klaŭnojn kaj aliajn artistojn. La rigardejo de la cirko estas rondforma, en la mezo estas manego. Parto de la cirko estas bestejo aŭ menagerio, kie estas kagoj kun bestoj. La prezentado en cirko aŭ varieteo gvidas kaberedestro, kiu informas kun humoro pri venontaj scenoj.

Muziko estas arto de belaj tonoj kunigitaj kun melodio. Muzikistoj ludas la melodion per muzikinstrumentoj parkere aŭ laŭ muziknotoj. Tono estigas per regula tremado de ia korpo. En multaj instrumentoj tremas dratoj el metalo aŭ alia materialo, kiuj nomigas kordoj. La kordoj estas diverse dikaj, tremigas ilin arco, fingroj, tremigilo aŭ io alia. Violonon kaj pli granden violon oni tenas en manoj sub mentono kaj tremigas per arcoj, violoncelo kaj pli granda kontrabaso estas apogataj sur planko kaj tremigataj per arco aŭ fingroj. Per fingroj aŭ tremigilo oni tintigas kordojn sur gitaro, bengo aŭ mandolino, kiujn oni tenas en manoj, aŭ sur harpo, kiu estas apogata sur planko. Fortepieno havas klavojn, per kiuj oni movas marteletojn, kiuj frapas sur kordoj. Zimbalono havas kordojn, frapantaĵajn marteletojn tenas muzikanto en siaj manoj.

En multaj instrumentoj tremas kolono de aero. Oni tion atingas buŝe aŭ per mekaniko. Flej simpla buŝa blovinstrumento estas fajfilo, klarneto, fluto kaj fifro havas nur pli multajn tonojn altajn, trumpeto kaj ĉaskorno ne havas tiom altajn tonojn. Saksofono, fagoto, trombono kaj hobojo kapablas ludi multajn tonojn. Sakfajfilo blovas aeron el sako, akordiono aŭ tirharmoniko havas balgojn. Orgeno kaj harmoniumo similas al piano, ili havas klavojn por unuopaj fajfiloj. Sur diversformaj tamburoj kaj globformaj timpanoj tremas membrano, cimbaloj estas du ladaĵ diskoj, triangulo tintas, ksilofono estas ladetoj tremigataj per marteloj en manoj. Krome ekzistas eliaj malnovaj aŭ nekutimaj muzikiloj. Nun helpas ec elektro tremigi kordojn kaj membranojn.

Prezentado de la muziko estas koncerto. Ofte oni ankaŭ kantas. Ĥoro estas grupo de kantantoj, viraj voĉoj estas tenoro kaj baso, virinaj kaj infanaj voĉoj soprano kaj alto. Orkestro estas diverse nombra grupo de muzikantoj. Marsanta orkestro estas kapelo. Kelkaj orkestroj havas specialejn nomojn: ĵazo, blovmuziko. Simile ekzistas muzikaĵoj: simfonio, melodramo, opero, opereto, muzikalo kaj aliaj. Bona muzikisto aŭ kantisto estas virtuozo. Laŭ la muziko homoj dancas. Dancoj estas rondaj kaj duopaj aŭ grupaj. Plej konataj duopaj dancoj estas valso, polko, tango, el grupaj polonezo. Ĥoreografio estas scienco pri dancoj kaj baleto. Akustiko estas scienco pri sonoj kaj tonoj. El vidpunkto de akustiko temas pri oscilado de aero, kiun perceptas orelo de homo.

Repertuaro estas sumo de komponaĵoj, kiujn orkestro ludas, aŭ sumo de teatraĵoj, kiujn teatro prezentas. Plej multaj orkestroj ludas laŭ la taktbastoneto de sia estro. Dramaturgo destinas repertuaron de teatroj.

Al la amuzo apartenas ankaŭ legado de beletro kaj pentrado. Oni povas ankaŭ mem pentri aŭ rigardi bildojn en galerioj kaj ekspozicioj. Bildoj estas pentrataj per peniko kaj koloraj materialoj, kiuj nomigas farboj, per krajono, kredo, karbo, plumo, inko aŭ tuco. Sgrafitoj estas bildoj elskrapitaj en du stukoj, ke aperas la linioj el la suba. Freskoj estas pentrataj rekte sur la stuko. Grafiko estas desegnaĵo de linioj, kiuj estigas bildon. Gravuraĵo estas bildo en malmola materialo. Ofte oni uzas kaŭstikaĵojn kaj faras akvafor-ton. Skulptado de reliefoj kaj statuoj laboras en la tria dimensio. Bildoj havas nur du dimensiojn, la trian dimension oni anstataŭigas per perspektivo, ombrado kaj haĉado. Bildo estas portreto de persono, sen-vivejo de objektoj, akto de nuda, precipe virina korpo, genro el ĉiutaga vivo, karikaturo, kiu mokas, kaj alia. Nun oni povas havigi bildojn ankaŭ per fotografado.

Ekzistas ankaŭ multaj aliaj formoj de amuzo. Grava estas belgusto. Estetiko estas scienco pri beleco kaj belgusto. Hobio estas amuzo agado de ĉiu belgusta speco. Hobie oni praktikas eĉ laborojn kaj profesiojn, oni estas diletanto kaj amatoro.

GRAMATIKO: 1. Trovu dek substantivojn kaj aldonu atributajn frezojn. Ekzemple: Ekzistas ankoraŭ aliaj formoj de amuzo. Vi atribuos: .... pri kiuj la temo ne parolas. 2. Trovu substantivojn kun sufikso -ejo kaj klarigu ilin.

STILO: 1. Priskribu vian spektadon de ia prezentado. 2. Preparu afison pri ia prezentado en Esperanto. 3. Skribu pri viaj favorataj aktoj, pentristoj, muzikistoj por via eksterlanda amiko.

DEMANDOJ: 1. Kiun specon de amuzo vi ŝatas plej multe? 2. Kiuj teatraĵoj aŭ filmoj estas en Esperanto? Kiujn vi mem vidis? 3. Pri kiuj laborantoj parolas afiso pri teatraĵo? 4. Kiuj laborantoj estas nomataj antaŭ filmo? 5. Nomu instrumentojn en diversaj orkestroj. 6. Kiajn filmojn vi ŝatas rigardi? 7. Ĉu vi rigardas ie bildojn? 8. Kiujn operojn vi vidis? Ĉu oni povas vidi operon en nekonata lingvo?

## el la sekretariejo

### S O U T Ě Ž

Komise pro tisk a informace ĈES ve spolupráci s vedením ĈES bude od 1. ledna 1987, v rámci jubilejních akcí, každé čtyři měsíce /t.j. v květnu, září a lednu/ vyhodnocovat příspěvky o esperantu v českém a slovenském tisku, rozhlase atd. Bude se posuzovat nejen počet, ale i závažnost příspěvků. Vyhodnocení autoři budou odměňováni věcnými cenami - knihami ze zahraničí atd. Navíc se budou vyhodnocovat dva nejpilnější autoři za příslušný kalendářní rok.

V dalším roce, který nebude jubilejní, bude KTI vyhodnocovat příspěvky dvakrát ročně. Z této akce jsou vyloučeny příspěvky vedoucího KTI ĈES.

Vedoucí komise pro tisk a informace ĈES Karel Kyr.

# SET LANĈOV

JUBILEA 35-a SOMERA ESPERANTO-TENDARO, LANĈOV, ĈEĤOSLOVAKIO

28. 6. 1987 - 11. 7. 1987 unua etapo  
12. 7. 1987 - 25. 7. 1987 dua etapo  
26. 7. 1987 - 8. 8. 1987 tria etapo

Esperanto-Klubo, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Třebíč, aranĝos Someran Esperanto-Tendaron (SET). Ĝi okazos en tri etapoj en la tradicia loko apud granda digolago de Vranov apud vilaĝo Lančov, distrikto de urbo Znojmo. La instruado de Esperanto okazos en ĉarma romantika regiono ĉiutage krom la dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin divergaj kursoj, nome

- A - por komencantoj
- B - por progresintoj
- C - konversacia
- D - por estontaj instruantoj
- E - por tradukantoj.

La supozataj scioj por kurso C devas havi nivelon de la lernolibroj Paŝoj al plena posedo (W. Auld), La tuta Esperanto (H. Seppik) k. s. Krome scio de la gramatiko devas esti tiagrada, ke la partoprenanto estu kapabla konversacii.

Ĉiu partoprenanto estas devigata frekventi iun el la indikitaj kursoj kaj respekti la tendaran regularon, pri kiu li estos surloke informita.

La tendaro troviĝas apud vilaĝo Lančov ĉe baraĵlago de Vranov. La plej proksima fervojstacio estas Šumná (trako 24). El Šumná oni atingos autobuse Vranov ĉe Dyje. En la tagoj de la alvenado estos en Vranov ĉe Dyje ĉe autobusoj videble indikita servado (deĵorantoj). Al Vranov ĉe Dyje eblas uzi rektajn kaj rekreaciajn autobusojn el Znojmo.

La mangoj en la tendaro komenciĝas en la tago de la alveno dimanĉo kaj finiĝas en la tago de la forveturo sabate.

La loĝado estas certigita en kvarlitaj kabanĵoj.

Posttagmeze okazos banado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kun kanto kaj simile. Muzikinstrumentoj bonvenaj. Estas kutimo fari murgazeton el bildkartoj aŭ prospektoj el via domicilio. Kunprenu la bildkartojn aŭ prospekton.

La tendarkotizo, kiu inkluzivas kvar mangojn tage, estas 1200 Kčs.

La aligo de eksterlandanoj validas post ricevo de antaŭpago 500 Kčs. Reston vi pagos persone en la tendaro. Post ricevo de via aligilo ni informos vin kiamaniere vi sendu la antaŭpagon. Aligontaj grupoj devas havi akompananton, kiu bone regas Esperanton. Grupoj de komencantoj krom tio devas havi sian kursestron. Al infan-grupoj ni proponas partopreni la 1-an etapon. Gvidanto, kiu akompanas 20-personan grupon, ricevos 100 % rabaton, gvidanto de 15-persona grupo 75 % rabaton, de 10-persona grupo 50 % rabaton kaj gvidanto de 5-persona grupo 25 % rabaton.

La ekkursoj - unu tuttaga autobuse kaj du duontagaj en ĉiu etapo ne estas enkalkulitaj en la tendarkotizo. Ilia prezo estas proksimume 80 Kčs. Ni invitas eksterlandajn samideanojn KUN BONA SCIO DE LA LINGVO, kiuj ŝatas tendaran vivon kaj volas perfektigi.

Dum pli ol 30 jaroj de SET partoprenis en ĝi gesamideanoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj kaj 4 transmaraj landoj. Ili helpis al ni krei la deziratan internacian lingvan etoson. Por ĉiu etapo ni akceptos nur la unuajn 120 aligilojn, tial ni urĝe konsilas al vi aligi plej malfrue ĝis la 15-a de majo. Post tiu ĉi dato ni akceptos vin, se estos ankoraŭ libera loko. La necesajn informojn rilate la alvenon, restadon kaj vivon en la tendaro ricevos ĉiu aliginto kune kun la konfirmo de akcepto.

Ni esperas renkonti ankaŭ vin en nia tendaro.

Nia adreso: Esperanto-Klubo, loka grupo de ĈEA  
CS-674 01 Třebíč  
ĈSSR

### A L I Ĝ I L O

Nomo kaj familia nomo:

Profesio:

Naskig-dato:

Adreso kun poŝta kodo:

Mi aliĝas al la \_\_\_\_\_ etapo, al kurso de \_\_\_\_\_ - grado

Subskribo de gepatroj ĉe aliĝantoj malpli ol 18-jaraj:

Per mia subskribo mi libervole devoligas min obei la tendaran ordon.

Subskribo:

Pro ĉeĝoslovenskaj zajeĝmce o taboro v Lanĉovĝe plati ĝnasledujici podminki: mladeĝ do 18 let plati 800 Kĝs, dospali 850 Kĝs. Ĉlenovĝe ĈES a SES, pokud se prihliasi a zaplati zalohu do 15. 6. 1987, zaplati mladeĝ do 18 let 770 Kĝs, ostatni 820 Kĝs, po 15. 6. 1987 zaplati mladeĝ do 18 let 800 Kĝs, ostatni 850 Kĝs.

Prihliĝka je plati aĝ po sloĝeni zalohy nejmene 500 Kĝs sloĝenkou na uĝet Klubu esperantistŝ, MS ĈES v Třebiĝi, u statni spořitelny ŝ. uĝtu 6006-145-718. Sloĝenku po obdrĝeni prihliĝky zaĝleme. Priĝem zalohy potvrdime souĝasne s oznamenim o prihliĝi. Doplatek je nutno vyrovnat stejnym zpŝasobem nejpŝzdeĝji do 15. 6. 1987.

Priĝjeti mohou byt uĝcastnici starŝi 12 let a na celŝy bĝh. Odhlasi-li se uĝcastnik nejpŝzdeĝji 14 dni pŝed zahajenim tabora, bude mu polovina zalohy vracena. Na pozdeĝji odhlasiĝky nemuĝe byt brán zřetel a zaloha propadne.

Denni sazba pro mimořadnĝe a krátkodobĝe návŝtavy je 60 Kĝs za osobu.

POZOR! Zvyĝhodneni pobytu pro skupiny dĝti a mladeĝe do 18 let na 1. bĝhu: pĝtiletlnnĝ skupina - poplatek na osobu 700 Kĝs  
desetiletlnnĝ skupina - poplatek na osobu 650 Kĝs  
dvacetiletlnnĝ skupina - poplatek na osobu 600 Kĝs.

Ve skupinĝch s vedoucim mohou byt i uĝcastnici mladeĝi 12 let.

Vedouci skupiny s 20 uĝcastniki mĝ pobyt zdarma, s 15 uĝcastniki plati 25 % poplatku, s 10 uĝcastniki plati 50 % poplatku, s 5 uĝcastniki plati 75 % poplatku. Zvyĝhodneni pro vedouci skupin plati i na 2. bĝh a rovnĝĝ bude-li se jednat o dospale uĝcastniki.

Ke studiu v kursech pro zaĝateĝnicki budete potŝebovat uĝcebnici ABC mezinarodniho jazyka od Th. Kiliana, v kursech pro pokroĝilĝ velkou uĝcebnici prof. Kiliana, La Mondo rakontas od tĝhoĝ autora, Historio kaj biografioj sestavenou J. Vondrouŝkem. Uvedenĝ uĝcebnice lze koupit pŝimo v tabore. Uĝcastnici D a E kursŝ budou informovani zvlĝŝtĝ.

Stravovani v tabore zaĝina obĝdem v den nastupu a konĝi obĝdem v den odjezdu v sobotu.

Kaĝdy uĝcastnik pŝedloĝi ĝestne prohlĝŝeni o bezinfekĝnosti okolí svĝho bydlitŝtĝ. Mladeĝi do 18 let toto potvrdi svŝm podpisem rodiĝe.

Bydleni je zajiŝtano v ĝtyřlŝĝkovŝch chatkĝch. Doporuĝujeme vzit s sebou: 2 ruĝnicky, utĝrku, kapesnicky, ponoŝky, ponoŝky, kartacek na zuby a pastu, mŝdlo, trenyřky, tĝlko, teplakovou soupravu, plĝŝt do deŝtĝ, pŝezŝvky - holinky, plavky, koŝile, kapesni nŝĝ, pero, tuĝku, seŝit ke studiu, ŝici potŝeby, ĝistici potŝeby na obuv, toaletni potŝeby.

Veĝery budeme trĝvit u taborovŝch ohnŝ. Pŝipravte si pŝedem scenky a vystupy! Hudebni nĝstroje jsou vitany. Rovnĝĝ si pŝipravte masku na mezinarodni karneval. Na zakladĝ vaŝeho zajmu zajistime autobusy na celodenni vŝlet. Zajem o uĝcast uvedte na prihliĝŝce. Na nĝstĝnku vezmĝte pohled nebo prospekt z vaŝeho domova.

# PLUAJ INFORMOJ

## 9-aĵ TURISMAJ TAGOJ EN ŽILINA

En la tagoj 2. - 8. 8. 1987 renkontiĝos en Žilina (Ĉeĥoslovakio) turistoj kaj naturamikoj el diversaj landoj dum 9-aĵ Turismaj Tagoj. Partoprenantoj loĝos en studenta hotelo en 2- kaj 3-litaj ĉambroj kun neceso kaj lavejo. Ili vizitos la plej belegajn regionojn de la montaroj Malgranda Fatra (kun fama Vrátna-valo) kaj Súlby-rokaron, kie okazos tuttagaj piedekursoj en 3 kategorioj (A - pretendemaj ekskursoj por bonaj turistoj, B - mezfacilaj ekskursoj, C - promenoj en la naturo por pli agaj naturamikoj kaj familioj kun malgrandaĵ infanoj). Krome estas preparita unu tuttaga busekurso, rostando de lardo kaj vesperaj amuzprogramoj. La partoprenkotizo estas 490 Kčs por enlandaĵ kaj 590 Kčs por eksterlandaĵ partoprenantoj. Estas eble mendi matenmangojn, vespermangojn kaj 2 tagmangojn sume por 200 Kčs. Detalaĵn informojn kaj aligilojn petu ĉe: Ing. Juraj GONDŽUR, Levočská 3, 010 08 ŽILINA, ĈSSR.

## RENKONTIĜO EN DUDINCE

La renkontiĝoj en Dudince estas jam tradiciaĵ. Ĉi-jare ili okazos jene: la printempa dum 3.-9. de majo, la aŭtuna dum 30.8. - 5.9.1987. La semajna restado kun ses tranoktoj kostas nur 150 Kčs. Oni povas resti ankau pli longe. Kuirejo estas senpage je dispono. En la programo estas banado en saniga termala akvo, interesaj ekskursoj kaj preleĝoj fare de fakuloj pri vivmedio- kaj natur-protektado, pri vegetarismo, makrobiotiko, natur-konforma vivmaniero, joko kun ekzercado. - Pri ekspedicioj al Himalajo kaj Pamiro rakontos partoprenintoj, same pri la tie vivanta Hunza-popolo, en kiu vivas eĉ 150-jaraĵ homoj sanaj, felicaj.

Inform-petojn, aligilojn adresu: Ernesto VÁŃA, CS-962 71 DUDINCE, Slovakio, ĈSSR.

## OFERTO DE III-a "PoSET"

De la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1987 ni aranĝos la III-an Potsadman Someran Esperantistan Tendaron (PoSET). PoSET ebligas ferian renkontiĝon de esperantistoj proksime de kultura centro de distrikturno Potsadam kaj de ĉefurbo Berlin, en junular-gastejo "Firschheide". Tie ekzistas eblecoj por tranoktado en bangaloj (po 8 litoj), separitaj al viraj kaj virinaj. Oni ne povas kuiri mem, sed estas ebleco en junular-gastejo por maten- kaj vespermangoj.

La prezo por unu personaĵo estas 90 markoj por la semajno kaj inkluzivas tranoktadajn, maten- kaj vespermangojn. Pluaĵn informojn kaj aligilojn oni povas ricevi ĉe:

Brigitte Raabe  
Sulzbacher Steig 1  
Staaken /GDR  
1546

Limdato de aliĝo: 31. majo 1987.

## KONKURSO de Internacia Asocio M O N D A T U R I S M O por la jubilea jaro.

Ni invitas vin partopreni la konkurson "ESPERANTO EN TURISMO" pri jena temo:

"ĈU ESPERANTO-TURISMO HELPAS LA ESPERANTO-MOVADON?"

Alvena limdato: 1987 - 09 - 15.

Premioj: senpagaĵ partopreno en Esperanto-aranĝoj en la jaro 1988.

La konkursaĵoj bonvolu sendi en du tajpitaĵ ekzempleroj al la adreso de vicprezidentino Elizabeta Fallos, Ybl Miklós u.9. I.2. H-7633 - Hungario.

MONDA TURISMO rajtigas sin publikigi la plej interesajn konkursaĵojn ĉu fragmente, ĉu plenfome. Ĉiu konkursinto dum la jaro 1988 ricevos la eldonaĵojn de MONDA TURISMO.

Atendante viaĵn utiligeblaĵn kontribuaĵojn ni deziras al vi sukceson.

LA 20-a INTERNACIA RENKONTO NATURAMIKA EN ABALIGET, HUNGARIO (IREN)

Ĝi okazos de la 13-a ĝis la 22-a de julio 1987 en Abaliget, 20 km de urbo Pécs, kun jena programo:

- interkona, ĵumulara, adiaŭa vesperoj, ĉifona balo
- matena gimnastikado, nagado, migrado en la montaro
- Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj
- konkursoj: "Kion vi scias pri Esperanto?", nagokonkurso
- surlaga boatado nokte kun lampiono
- vizito de stalagmita groto, tendarfajro, popoldancoj ktp.

K o t i z o j ppr unu persono, sen manĝoj (por eksterlandanoj):

A) en cambro 1 au 2-lita kun duŝejo	2.300 Ft-oj
B) en cambro 1 au 2-lita kun lavejo	2.100 "
C) en cambro 2-lita kun lavnicio	1.900 "
D) en cambro kun 12 au 20 litoj	1.200 "
E) en propra tendo	900 "

La manĝadoj okazas en restoracio "Camping" 3-foje tage. La manĝoservo komenciĝas la 13-an de julio 1987 per vespermanĝo kaj finiĝas la 22-an de julio per tagmanĝo kaj kostas entute 1300 forintojn. Se vi deziras kompletajn servojn kaj kunestadon, bv. aldoni al la kotizoj mil tricent forintojn.

L i m d a t o de aligo: 1 9 8 7 - 0 6 - 2 5.

La aligo validas nur post la enpago de kotizo lau la konfirmilo.

Okaze de rezigno ĝis la 10-a de junio 1987 la pagita sumo disponeblas por la venont-jara 21-a IREN. Volontuloj el socialismaj landoj bv. informigi pri la transpago de kotizo ĉe IBUSZ-agentejo en via ĉefurbo. R a b a t o n ricevas varbintoj de grupoj kun 10 personoj 50 %, kun 20 personoj 100 %.

R i m a r k o j :

- IREN estas turista renkonto, kiam por kampadeja restado, ekskursoj necesas taŭgaj suoj, vestoj.
- La kapacito de la kampadejo permesas akcepti 100 personojn. La kategorioj estas elekteblaj je frua aligo.
- La kampadejo disponas pri varma akvo en lavejoj kaj duŝejoj.
- La 20-a IREN amike atendas niajn karaajn malnovajn IREN-anojn kaj novajn gastojn.

Per detalaj informoj estas je via dispono kaj atendas vian baldaŭan aligon

I R E N , DEPARTEMENTA KOMITATO DE H E A , Pécs, Pf. 2. H-7601

LERNEJO ESPERANTO EN KILIÁNTELEP (apud Balatono) - 1987-07-10/17

Loko de la aranĝo: Kampadejo de Vojaĝoficejo Express, Kiliántelep,

- por bazlernejanoj ĝis 14-a jaraĝo "LEB"
- por mezlernejanoj, politeknikaj lernantoj ĝis la 18-a jaraĝo "LEM"
- por plenkreskuloj, pedagogoj kaj studentoj "LEP"

- 7 gastotagoj

Unua servo: vespermanĝo la 10-an de julio.

Lasta servo: tagmanĝo la 17-an de julio.

Trankvilito: en dultaj lignaj dometoj, duŝejo, necesejo en apartaj blokoj.

La ĉiutaga 4-hora lingvoinstruado en ĉiuj kategorioj okazos en diversaj gradoj. Por pedagogoj, kiu instruas Esperanton, estas planata speciala altnivela kurso por pli perfektigi la lingvoscion. Por ĉiuj partoprenantoj de LEP kaj LEM estas novaĵo, nome la organizantoj ricevis rajton de UEA por ebligi al la gastoj fari Internacian Ekzamenon pri lingvo Esperanto dum la restado en Kiliántelep. Oni invitos responde-culojn de la Internacia Ekzamenkomitato kaj de ILEI, por ke ili gvidu la ekzamenojn. Kiliántelep estas ne nur ripozloko, sed loko de serioza laboro.

Adreso: E-sekcio de Vojaĝoficejo EXPRESS, Szabadság tér 16, H-1395 Budapest V.

SELE, SOMERA ESPERANTO-LERNEJO en urbo Eger - 1987-08-04/16

Dommaŝto de la arango: Departementa Komitato de HEA en Heves.

Aligdato: 1987-06-25

12 gastotagoj

Unua servo: vespermango la 4-an de aŭgusto.

Lasta servo: tagmango la 16-an de aŭgusto.

Tranoktado: en mezlerneja hejmo en 4-litaj ĉambroj, duŝejo, necesejo suretage.

Instruado: 4 studhoroj potage en diversaj gradoj, sub la gvido de eksterlandaj profesoroj de Esperanto.

FABRI, FERIA, AMIKA, BÖRZSÖNY-MONTARA RENKONTO INTERNACIA - 1987-08-16/23

Kunorganizanto: hungara E-sekcio de Automobilista Klubo Internacia

Loko de arango: Kampadejo de Vojaĝoficejo Express en Verőcemaros, inter la montaro

Börzsöny kaj Danubo, 60 km norde de Budapeŝto.

Unua servo: vespermango la 16-an de aŭgusto.

Lasta servo: tagmango la 23-an de aŭgusto.

Tranoktado: en 2-litaj motelĉambroj kun lavejo, sed duŝejo, necesejo en apartaj blokoj. Mankaĵo: trifoje tage en la restoracio de la kampadejo, kun servoj.

Provizora programo: urborigardo de Budapeŝto, piedekskurso al montopinto "Esperanto", ekskurso per etŝpura fervojo al "Királyrét", ŝipekskurso al la historia urbo de Danubkurbigo Esztergom, interkona kaj adiaŭa vespero, literaturaj prelegoj, diafilmprezentadoj, banado, tuttaga partopreno en la Nacia Festo de Hungario en Budapeŝto, ekskurso al urbo Vác, apudnuba bivakfajro de adiaŭa vespero kaj vingustumado. Dum la programoj okazos lingvoekzerco en Esperanto.

Tutsomera Esperanto-Ripoztendaro por infanoj kun lingvoekzerco.

Loko de arango: Csokonyavisonta, 45 km okcidente de urbo Kaposvár. Csokonyavisonta havas tre bonan kuracakvon kaj modernan subcielejan, kaj tegmentitan banejon.

5-taga restado ekde la 9-a de julio ĝis la 25-a de aŭgusto. Samtempe povas esti ĉiam 40 personoj.

Tranoktado: en 3-4-litaj lignaj kabanoj de Kampadejo, lavejo en la dometoj, necesejo aparte, duŝejo en la domo de la baseno.

Provizora programo: autobusekskurso al Balatonmárfürdő, ŝipekskurso al Badacsony, urborigardo de Kaposvár, sportludoj, kvizoj, diskoteko. Ĉiutage lingvoinstruado kaj ekzerco.

ZIP, Zamenhof-Internacia Pacmarŝo - 1987-05-08/10

Loko de arango: Kampadejo de Vojaĝoficejo Express en Verőcemaros.

Organizanto: Budapeŝta Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, 1443 Budapest, Pf. 153.

2 gastotagoj, unua servo: vespermango la 8-an de majo, lasta servo: tagmango la 10-an de majo. Tranoktado: en 2-litaj ĉambroj en la motelo kun lavejo, duŝejo, necesejo aparte.

Provizora programo: interkona vespero, ekskurso al la montopinto "Esperanto", al la elvidejo "Zamenhof", kultura programo, abundaj amuzaj programoj.

SEU, 25-a SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO - 1987-06-26/07-03

Loko: Gyula.

Organizanto: TIT/SEU, Gyula 48-as út 11, H-5700.

SEKEL, Someraj Esperanto-Kursoj en Lingvolaboratio - 1987-08-09/19

Loko: Szombathely

Organizanto: Departementa Komitato de HEA en Vas. Szombathely Pf.45. 9701

Aligdato: 1987-07-15

Tranoktado: en studentaj domoj en 4-litaj ĉambroj, duŝejo, necesejo suretage.

Programo: 24-hora lingvoinstruado en diversaj gradoj, en lingvolaboratorio, posttagmeze abundaj programoj, inter ili rigardo de la urbo, vizito de la romiaj restaĵoj, ruinoj kaj Isis-templo, ekskurso al malnova historia urbo Kőszeg, amikaj vesperoj, renkontoj kun lokaj esperantistoj.

17-a Vintra Esperantista Feriado, VEF

Dato: 1987-12-28/1988-01-02, 5 kompletaj gastotagoj, unu tagmango

Aligdato: 1987-11-30

Loko de la arango: Budapeŝto

Organizanto: Budapeŝta Komitato de HEA, 1443 Budapest Pf.153.

Tranoktado: en studentaj domoj en kat. A en 2-litaj ĉambroj, en kat. B en 3-4-litaj ĉambroj, duŝejo, necesejo suretage.

Programo: interkona vespero, urborigardo en Budapeŝto, muzeo-vizitado, "Kiu kion scias"-kvizo, diskoteko, tuttaga ekskurso al tri diversaj lokoj laŭ elekto aŭtobuse, teatra vespero, seminarioj, SILVESTRA BALO, adiaŭa vespero.

7-a Internacia Konkurso-Recitalo pri Botev kaj Bulgara Poezio en Esperanto

Dato: 1987-05-29/06-03

Loko: Vraca en Bulgario

Tiu ĵam tradicia arango okazos en kadro de la Naciaj Kulturaĵoj "Botev-tagoj '87" dediĉitaj al la 111-a datreveno de la heroo pereco de la fama poeto Ĥristo Botev - simbolo de la bulgara libereco kaj literaturo.

La programo inkluzivos ankoraŭ grotan koncerton, 10-kilometran piedmarŝadon, renkontigon kun la loka esperantistaro kaj partoprenon en la oficialaj solenaĵoj de "Botev-tagoj '87".

Korespondadreso: Esperanto, p.k. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.

Internacia Konferenco "Esperanto en la Profesio" kaj

2-a Internacia Scienca Esperanto-Seminaro pri Kosmaj Esploroj

Dato: 1987-10-16/20


La unua arango klarigos la aspektojn kaj problemojn de la uzo de Esperanto en la profesia agado, kaj la dua montras, kiel nia ĵam centjara lingvo povus esti uzata en la laboro de la sciencistoj pri kosmaj esploroj. En la arangoj eblos ankaŭ koresponda partopreno.

La programo inkluzivos ankoraŭ renkontigon kun la loka esperantistaro, ekskurson al la groto "Lednika", viziton de la Astronomia observatorio en urbo Belogradĉik kaj viziton de la ĉefurbo Sofio.

Korespondadreso: Esperanto, p.k. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.







# KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

30-jara esperantisto intersanĝas plaktik-modelojn de aviadiloj 1/72, intersanĝas katalogojn KP-CS kontraŭ aliaj. Intersanĝas po tri bildkartoj al ĉiu. Pentru mapeton de via lando kaj indiku lokon. Adreso: Petr Knížík, nám. Pionýrů 115/1, CS-351 01 Mariánské Lázně.

Pola esperantistino dez. kor. kaj intersanĝi postmarkojn. Adreso: Maria Sperra, 77-424 ZAKRZEWO, Pollando.

21-jara pola fraŭlino laboras en la antaŭlernejo, interesigas pri turismo, literaturo, folkloro kaj lernado de lingvoj; kolektas bildkartojn kaj librojn. Adreso: Wanda Niemiecka, Grębow 917, 39-410 GRĘBÓW, woj. Tarnobrzeg, Pollando

30-jara fraŭlo, ĵurnalisto, volas korespondi kun e-istoj el la tuta mondo, interesigas pri informado, internacia politiko, dokumenta kaj fabela filmo, aŭtomobila sporto kaj ekstarordinaraj eventoj el la mondo. Adreso: Damian A. Zaczek ul. Daszowska 2/5, 04-354 WARSZAWA, Poll.

39-jara instruistino interesigas pri turismo, literaturo, historio kaj folkloro, kolektas bildkartojn. Adreso: Józefa Pokusa, ul. Morcinka 6 m 148, 93-217 ŁÓDŹ, Pollando.

8-jara lernantino interesigas pri turismo kaj filatelo, kolektas bildkartojn kaj postmarkojn. Adreso: Agata Pruszczyk, str. Fawia 37/57, PL 59-300 LUBIN, Poll.

25-jara polo interesigas pri turismo, sporto kaj fotoarto, kolektas bildkartojn kaj turismajn prospektojn. Adreso: Marek Ciupek, 38-311 SZYBAŃK 373, woj. Nowy Sącz, Pollando.

21-jara studentino, nova esperantistino, interesigas pri literaturo, sporto kaj lingvoj; parolas ankaŭ angle kaj svede. Adreso: Anita Szczygielska, ul. Bydgoska 23 B/6, 10-243 OLSZTYN, Pollando.

34-jara polo interesigas pri geografio, historio, literaturo, etnografio, muziko,

junulara muziko, lingvistiko, maristiko, turismo, pentroarto, filozofio, poezio, nautiko, velado, lia hobbio: libroj, vortaroj, bildkartoj, vojagoj, gramofondiskoj. Adreso: Stanisław Zalewski, ul. Traugutta 24/101, 43-322 CZECHOWICE -DZIEDRICE, Pollando.

22-jara studento interesigas pri turismo muziko, ĵurnalismo, sporto. Adreso: Rafał Frąckowiak, Korczaka 10, 64-000 KUSCIAN, Pollando.

25-jara ŝoforo interesigas pri literaturo, sporto, enigmoj nekompreneblaj, kolektas postmarkojn. Adreso: Zdzisław Bociaga, ul. Sieradzka 51, 98-300 WIELUN, Pollando.

28-jara laboristo dez. kor. tutmonde, ĉiuj temoj, respondas certe. Adreso: Bogusław Urbaniak, ul. Kosciuszki 7, 42-620 NAKŁO ŚL., Pollando.

27-jara fraŭlo, interesigas pri bildkartoj kun diversaj landoj, urboj, hundoj, katoj kaj floroj, kolektas artafisojn aŭ afisojn, bildkartojn de kanzonistoj, diversaj landoj kaj urboj. Adreso: Daniel Checko, str. St. Batorego n-ro 2, PL-68-200 ZARY, Pollando.

24-jaraj geedzoj volas korespondi kun personoj el Ĉeĥoslovakio. Li studas en Agrokultura Akademio en Krakovo, ŝi laboras. Adreso: Georgo kaj Beata Karelus, ul. Zubrzyckiego 1/9, 43-300 BIELSKO-BIAŁA, Pollando.

25-jara instruistino interesigas pri turismo, literaturo kaj historio, kolektas bildkartojn. Adreso: Grażyna Urban, str. Chrobrego 6 m. 54, PL-08-110 SIEDLCE, Pollando.

Instruistino kaj ŝiaj 35 geleernantoj (9 - 16-jaraj) deziras korespondi tutmonde. Komuna adreso: Anja Voĵnaroviĉ, 143871, AVDEJKVA-5, Doneckoj obl., abon. kasto 12C, Sovetunio.

13-jara lernantino tre deziras korespon-  
di, ŝi kolektas (poŝ)kalendaretojn. Ad-  
reso: Dom pionerov, Interklub, Oksana  
Kohaneva, ul. Molodaĵnaja 4,  
343871 g. AVDEEVKA-5, Doneckoj obl.,  
USSR.

Deziras korespondi: Janis Dzeme,  
Cesu r., p. 1. Priekuli, Latv SSR,  
USSR.

Deziras korespondi: Ljubomir Trifoncov-  
ski, str. Stambolijski 17.ap.11,  
BG-3000 VRACA, Bulgario.

Deziras korespondi, intersingas E-librojn  
kaj aliajn esperantaĵojn: T. Batzaya,  
poste restante, P.O. Ulan-Bator 46,  
Mongolio.

S-anino Maria L. Murphy, Port Charlotte,  
FL 33948 skribis al ni: Dum lasta monato  
ni ricevis multajn leterojn, kiuj ankoraŭ  
ciam alvenas. Oni publikigis nian adreson  
en via informilo. Ni ne povas individue  
respondi al tiuj leteroj. Mi provas pu-  
blikigi ilin en nia nacia organo, sed mi  
tuj devas aldoni, ke ni estas malgranda  
grupo da esperantistoj, kiuj plej ofte  
jam havas sufiĉe da korespondantoj.

20-jara marokano estas sporton, muzikon,  
volas korespondi kun knabinoj 15-18-ja-  
raj, parolantaj la francan au anglan.  
Adreso: Abdellatif DARDAK, BP: 5528  
Takatoum, CASABLANCA 05, Maroco.

Franclingve deziras korespondi pri Espe-  
ranto s-ro EL MOUKH SAID, BD: Attaoune,  
Rue 74 - No 19, Cité HASSANI, CASABLANCA  
02, Maroco.

Post tralego de artikolo pri Esperanto  
en la franclingva revuo Ĉeĥoslovakaĵ  
Sindikatoj n-ro 4/1986 deziras korespon-  
di kun iu el Ĉeĥoslovakio franclingve  
kaj esperantlingve AZIZ TEKKI, Bloc 8  
n-o 355, Cité Municipale, Cité Hassani,  
CASABLANCA /02/, Maroco.

Post tralego de revuo "Sindicato Checo-  
slovacoa" deziras korespondi en Esperan-  
to Nery Ramos Rojas, Casixto Garcia No  
6, REMEDIOS V. C., Cuba. Ŝi estas far-  
maĉiisto, ŝia edzo fotografo.



33-jara diplomita flegisto volas  
korespondi kun esperantistino el  
Ĉeĥoslovakio. Liaj intereso: medi-  
cino, precipe psikiatrio kaj neuro-  
logio. Li satas danci, promeni en  
la naturo kaj ĝui la silenton en la  
naturo, vojagi per automobilo, iri  
al kinejo, legi interesajn librojn,  
nagi, li satas la sunon. Lia adreso:  
Eugen KUTZ, Fachklinik "Fürstenhof"  
3590 Bad Wildungen, B.R.D.

Fondigis nova servo por esperantistoj -  
geedziga. Geesperantistoj, se vi volas  
havi esperantistan familion internacian,  
turnu vin al ni. Vian foton, informon  
pri vi kaj deziremaĵojn sendu al  
Fotoklubo, kesto 175, P.O. MINSK,  
220050, USSR.

17-jara bulgaro Dimitar, kiu loĝas en  
urbo Varna kaj estas lernanto en la  
fervojista lernejo en la urbo Gorna  
Orehovica, volas korespondi, sed for-  
ĝesis skribi sian adreson sur la vidaĵ-  
karton, kiun li sendis al ni. Do, kara  
Dimitar, ni atendas vian adreson!

16-jara hispano, komencanto, deziras  
korespondi kun proksimume samjara ĉeĥa  
knabo au knabino. Li korespondus pri  
kia ajn temo. Adreso: Xesús Muñoz  
Pardavila, Pza. de Balaidos, 3, 8- Izda.  
36210 - VIGO /Pontevedra/, Hispanio.

18-jara germano volas korespondi kun e-  
isto el Ĉeĥoslovakio. Adreso: Marcus  
Kreiger, Leninallee 10, DDR-1017 Berlin

## SKRIBIS AL NI

Novjarajn salutojn kaj bondezirojn sendis al nia redakcio Antanas Gvildys, prezidento de "Horizonto" en Jurbarkas, Sovetunio; Anja Vojnaroviĉ, Avdeevka, Sovetunio; Ĉestmír Vidman el Praha; Arnošt Vána el Dudince; Karel Strouha el Náchod. Al ĉiuj ni plenkore dankas kaj recipokas.

S-anino Bartovská skribis al ni: En Starto 3/86 oni skribas: "Estas senseencaĵo rifuzi tiun ĉi radikon (komputer)." Kaj tamen mi rifuzas: ekzistas verbo "komputi", do komputero povas esti elemento de ĉi procedo. - Multaj vortoj finiĝas per -or- kaj tiam temas pri relative komplika aparato: motoro, tranzistoro, elevatoro, kial ne "komputoro"?

La apudan ortangulon distondu laŭ dikaj linioj. El unuopaj partoj muntu la saman ortangulon, sed kun sercata teksto. (Sendis K. Strouha.)



(Fino el paĝo 10)

ni forveturadis kun plano kaj espero viziti kaj partopreni ankaŭ venontjaran 19-an kongreson de IFEF, kiu okazos en Katowice /Pollando/ en la tagoj 16-a ĝis 22-a de majo 1987. Aligu kaj partoprenu ankaŭ vi!

Jindřich Tomášek

Foto sur la koverto : Ing. Zbyněk KHAIL


9	8	7	T	R	E	K	L	U
J	A	R	L	A	U	U	R	B
V	E	N	N	U	A	E	R	A
7	-	I	N	T	O	B	O	E
D	E	K	I	9	O	O	N	A
N	L	A	-	O	K	O	D	E
Ĥ	O	D	A	D	A	E	S	P

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al presejo 15.2.1987. Jarabono 24 CSK. Por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, Vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6 x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3. 1985. Tiskna RUCH Liberec. Předáno do tisku 15.2.1987. Dohledací pošta Praha 07. Sniženy poplatky za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1 - 1267 ze dne 6.4.1979.

novinka!

# STOJÁNEK na lepicí pásku



Strojek, sloužící k snadnému odvinutí, navlhčení a odtržení potřebného kusu papírové lepicí pásky s vrstvou vodou rozpustného lepidla.

Stojánek včetně vlhčícího válečku je odlit z polyesterové pryskyřice. Trhací hřeben je ocelový s antikorozií povrchovou úpravou.

Při práci se stojánkem se doporučuje přidat do vlhčícího roztoku několik kapek saponátu, aby se zlepšila smáčivost vrstvy lepidla.



Vyrábí: RUCH LIBEREC

Široká ul. 31

PSČ 460 31

telefon 281 47, 233 83

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**